
EL POPOLA ĈINIO

5
1976

中国报道







En prospero *(akvarelo)*



Lu Ĉanghaj, sekretario de la partia filio kaj milicia kompaniestro de Panŝivan

# Panŝivan—revolucia moderna pekina opero en kolora filmo





Sub eduko de Lu Canghaj, Hajgen decidis firme teni sian pafilon kaj trapasi la provadon de batalado kontraŭ surteriĝintaj malamikaj spionoj.




Sin kaŝante en bambuaro, Lu Ĉanghaj kaj milicia plotonestrino Hajjun singardeme atendas malamikan spionon 08, kiu ŝtele surbordiĝis por kontakti Kiu Erneng.



Antaŭvespere de la Nacia Festo de 1963, maljuna fiŝisto Onklo Hiangvu trovis en arbotruo pakajon, en kiu estis blanka tuko kun surbrodita sepio kaj ponardingo. Lu Ĉanghaj divenis, ke tio estas kontakta signo de malamikoj por ataki Panŝivan.

Lu Ĉanghaj superruzis spionon 08, kiu venis kun ponardo por kontakto, kaj informiĝis de li pri la agada plano de la malamikoj.





Profitante de tio, ke la malamikoj intencas ŝin subaĉeti per mono, Avino Zeng helpas sian filinon rekoni la alivestitajn malamikojn.



Avino Zeng rakontas al Atuan heroan agon de Lu Ĉanghaj en lia knabeco kaj kuraĝigas lin batali sentime kaj lerte.








Lu Ĉanghaj profunde enpenetris en Fengvo-kavernon por savi Atuan kaj luktis kun malamikaj spionoj en mallumo.





Per sangmakulita tuko Lu Ĉanghaj volvis la signallanternon por alvoki la ĈPLA-trupon kaj milicion, kiuj serĉas la malamikojn, kaj samtempe li sentime faris mortan batalon kontraŭ la malamikaj spionoj.

Lu Ĉanghaj brave batalas kontraŭ Nigrakapa Ŝarko.

EL POPOLA ĈINIO
中国报道
N-ro 5
(214)
1976

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

*Bildpaĝoj:*

1. Hijang-gubernio antaŭenmarŝas per grandaj paŝoj
2. Malsovaĝigo de blanklipa cervo
3. Panŝivan — revolucia moderna pekina opero en kolora filmo
4. Fruktoj de scienca esplorado de instituto en kunlaboro kun fabrikoj

*Kovrilo:*

paĝo 1: Membroj de Giedu-komunumo de Hijang-gubernio tunelas por ŝanĝi la fluejon de rivero.

paĝo 2: En Prospero (*akvarelo*)

paĝo 3: Eburaj skulptajoj

paĝo 4: Printempo en Hijang



# Enhavo

Batalo disvolvata en Ĉinio kontraŭ reviziisma linio . 2
Kritikado de "Akvorando" en Ĉinio . . . . . . 7
Hijang — Daĝaj-tipa gubernio . . . . . . . . . 11
Hijang kun nova fizionomio . . . . . . . . . 18
Novaj socialismaj kamparanoj . . . . . . . . . 23
Tri poemoj pri lernado de Daĝaj . . . . . . . . 27
La Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo . . . . . . . . . 30
Revolucia moderna pekina opero "Panŝivan" . . . 34
Ĝojindaj atingoj de la ĉina film-industrio . . . . . 36
Pri nova terapio de ostorompiĝo . . . . . . . . 38
AMIKECO: Eterne daŭros la torentoj de Jangzi kaj Sejno 40
ĈINAJ NACIECOJ: La nusu-oj . . . . . . . . . 41
METIARTAĴOJ: Unu granda ebura skulptajo . . . . . 42
HISTORIAJ RAKONTOJ: Socia reformo de Ŝang Jang . . 44
Kurantaj Aferoj . . . . . . . . . . . . . . 45
Song Giang — kapitulacisto en "Akvorando" . . . . . . 48

# Batalo disvolvata en kontraŭ reviziisma

de **HIN HUA**

SUB la iniciato kaj gvido persona de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo nun estas disvolvanta batalon kontraŭ la vento de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn. Ĝi estas linia batalo kontraŭ la en-partiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj persistas en reviziisma linio kaj intencas ŝanĝi la socialisman vojon de la ŝtato kaj restaŭri kapitalismon en Ĉinio.

La batalo inter la du linioj elstare manifestiĝis en sinteno al la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la en ĝi emerĝintaj novaj revoluciaj aferoj. La vastaj popolamasoj de Ĉinio opinias, ke la Granda Proleta Kultura Revolucio, kiu plifirmigis la socialisman novan Ĉinion kaj multe antaŭenpuŝis la socialisman socion, estas tre bona. Ili varme laŭdas kaj entuziasme subtenas la novajn socialismajn aferojn emerĝintajn en



*Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de Kinghua-universitato skribas dazibaŭojn por rebati la venton de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn.*

# Ĉinio
# inio

tiu revolucio. Sed la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj persistantaj en reviziisma linio energie levis diablan venton kaj diris diversajn absurdajn opiniojn en julio, aŭgusto kaj septembro de la pasinta jaro, por neigi la Grandan Proletan Kulturan Revolucion kaj la en ĝi emerĝintajn novajn aferojn, kaj kalumniis, ke la enlanda situacio hodiaŭ estas malpli bona ol la hieraŭa. Ili kalumniis, ke la eduka revolucio "rifuzas sciojn" kaj "rifuzas edukon", atakis la ĝustan principon, ke **eduko devas servi al la proleta politiko kaj eduko devas kombiniĝi kun produkta laboro,** kaj plenenergie subtaksis la novajn aferojn de funkciigo de lernejo kun malfermita pordo, vizitado de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj al altaj lernejoj ktp. La Granda Proleta Kultura Revolucio ja komenciĝis per oponado kontraŭ la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki sur la kultura kaj eduka fronto. Ili faris atakojn en la sferoj de sciencoj, teknikoj, literaturo kaj arto, oponis kontraŭ kombiniĝo de sciencaj esploroj kun produkta praktiko, oponis kontraŭ entreprenado de sciencaj laboroj sinapoganta sur la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj kaj atakis la revolucion de literturo kaj arto kaj la revoluciajn modelajn teatrajojn.



*La instruistoj kaj studentoj de la Ĉaŭjang-a Agronomia Instituto verkis multajn dazibaŭojn por senkompate rebati la venton de dekstra oportunismo.*

En la komenco de novembro de la pasinta jaro, oni unue faris rebaton al tio en Kinghua-universitato. En formoj de libera esprimo de opinioj, dazibaŭoj kaj debatoj, la vastaj amasoj de instruistoj, studentoj kaj laborantoj malkaŝis kaj kritikis la absurdajn opiniojn de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon montrante faktojn kaj racie rezonante. Tuj poste ankaŭ la Pekina Universitato kaj aliaj edukaj kaj sciencaj institucioj komencis furiozan rebaton al la absurdaj opinioj de edukaj kaj scienc-teknikaj rondoj. Tio estas tre

konforma al la volo de ĉiunaciecaj popolanoj de la tuta lando kaj gajnis ilian varman subtenon.

Sekve de profundiĝo de la batalo, granda nombro da problemoj estas malkaŝitaj, kiuj montras, ke la absurdaj opinioj aperintaj en la edukaj kaj scienc-teknikaj rondoj estas ne izolaj sed devenintaj de unu sama fonto kiel tiuj en la aliaj sferoj de la socio. Tio montras, ke ekzistas reviziisma linio kiu faras plenampleksan atakon kontraŭ la proleta revolucia linio kiu direktas Ĉinion venke antaŭenmarŝi laŭ la socialisma vojo. La programo de tiu linio estas la t. n. "preni la tri instrukciojn kiel ĉefĉeneron".

Tiu reakcia programo estis elmetita en somero de la pasinta jaro. La enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj ne volanta pentofaron oponas kontraŭ la ruĝa flago svingante "ruĝan flagon", eklektikisme distordis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri studo de la teorio pri la diktaturo de la proletaro por kontraŭbatali kaj preventi reviziismon, pri stabileco kaj unuiĝo kaj pri disvolvo de la nacia ekonomio, ilin kunordigante kaj asertante, ke ili estas "la ĉefĉenero en ĉiuj laboroj". Tio signifas konfuzon de la ĉefĉenero kun la dependaj, anstataŭigon de la ĉefĉenero per dependaj, neigon de la fundamenta linio de la Partio kaj neigon de la multfoje ripetita instrukcio de Prezidanto Maŭ, ke en la socialisma periodo klasbatalo estas la ĉefĉenero en ĉiuj laboroj.

Prezidanto Maŭ montris antaŭ nelonge: "Kio **estas 'preni la tri instrukciojn kiel ĉefĉeneron'! Stabileco kaj unuiĝo ne signifas forlason de klasbatalo. Klasbatalo estas la ĉefĉenero kaj ĉio alia dependas de ĝi.**"

Laŭ marksisma-leninisma vidpunkto, en la tuta historia periodo de transpasado de kapitalismo al socialismo ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo; en klasa socio, klasbatalo ĉiam estas la movforto de evoluo de la socio — tio ĉi estas historia leĝo neŝanĝebla laŭ homa volo. Prezidanto Maŭ ĉiam opinias, ke en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado oni devas preni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron, instrukcias al la tuta Partio kaj la tuta popolo **neniam forgesi la klasojn kaj la klasbatalon,** kaj en la 26 jaroj post la fondo de la nova Ĉinio




*Studentoj de la filozofia fakultato de la Pekina Universitato kritikas en klasĉambro la krimojn de tiuj, kiuj levis la venton de dekstra oportunismo por renversi la ĝustajn verdiktojn kaj distrumpetis la tezon de Konfucio "sinregi por restarigi etiketon" kun la vana espero restaŭri kapitalismon en Ĉinio.*

*La laboristoj, kadroj, sciencaj laborantoj de la Genetika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj reprezentantoj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kune kritikas reviziismajn absurdaĵojn en sciencaj kaj teknikaj rondoj por rebati la venton de dekstra oportunismo.*




plurfoje mobilizis kaj direktis la tutan popolon venke disvolvi klasbatalon de la proletaro kontraŭ la burĝaro. La Granda Proleta Kultura Revolucio komencita antaŭ dek jaroj estas granda klasbatalo de la proletaro kontraŭ la burĝaro.

Per granda kvanto da faktoj, revoluciaj amasoj malkaŝis, ke la celo de la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon kaj ne volanta pentofaron en elmeto de la propono "preni la tri instrukciojn kiel ĉefĉeneron" estas efektive oponi kontraŭ la instrukcioj de Prezidanto Maŭ.

La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon menciis la instrukcion pri studo de teorio kaj kontraŭbatalo kaj prevento de reviziismo nur por trompi la amasojn. Ili mem ne studis nek sciis Marksismon-Leninismon kaj ankaŭ oponas kontraŭ studo de revolucia teorio fare de la vastaj amasoj. Ĝuste kiam la movado de la tutlanda amasa studo de la teorio pri la diktaturo de la proletaro profunde disvolviĝis en la pasinta jaro, ili energie levis "tajfunon de profesiaj laboroj" kaj "tajfunon de ekonomio" vane intencante forblovi la movadon. Ili neniam parolis pri tio, ke la kontraŭdiro inter la proletaro kaj la burĝaro estas la ĉefa kontraŭdiro en la nuna Ĉinio kaj neniam parolis pri tio, ke reviziismo estas la ĉefa danĝero en la nuna tempo, sed ĉie distrumpetis pri estingiĝo de la klasbatalo.

Pretekstante tenon de stabileco kaj unuiĝo ili subpremis la batalon de la tuta popolo kontraŭ iliaj aktivadoj por restaŭro de kapitalismo kaj direktis sian lancpinton kontraŭ la vastaj revoluciaj amasoj kaj kadroj. Kun diversaj pretekstoj ili forpuŝis kaj batis la novajn kaj malnovajn kadrojn, kiuj persistas en la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj en gravajn postenojn instalis homojn, kiuj oponas kontraŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ili neigis la kombiniĝon de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj, subpremis novajn fortojn, malharmoniigis la rilatojn inter la Partio kaj la popolo kaj subfosis la stabilecon kaj unuiĝon.

Tiuj homoj uzas disvolvon de la nacia ekonomio kiel mantelon por kaŝi la restaŭradon de kapitalismo. Sub tiu mantelo ili elmetis ĉiujn reviziismajn varojn malbonodorajn pro forta kritikado en la Granda Proleta Kultura Revolucio, kiel la reviziisman teorion de produktaj fortoj, administradon de fabrikoj per specialistoj,

materian instigon, pledon por profito en komando kaj kompradoran filozofion.

Granda kvanto da faktoj malkaŝitaj de revoluciaj amasoj plene montris, ke la esenco de neigo de preno de klasbatalo kiel la ĉefĉenero estas neigi la Grandan Proletan Kulturan Revolucion, neigi la batalon de la proletaro kontraŭ la burĝaro, renversi la ĝustan verdikton al la reviziisma linio kritikita en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj restaŭri kapitalismon.

La batalo nun disvolviĝanta en Ĉinio por rebati la reviziisman linion estas daŭrigo kaj profundigo de la Granda Proleta Kultura Revolucio. Ĝi estas en la Partio neevitebla speguliĝo de la batalo inter la du klasoj kaj la du vojoj en la socio. La enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj reprezentas la interesojn de la faligitaj bienularo, burĝaro kaj la nove aperintaj burĝoj, ĉiam volas elsalti por provi sian forton kontraŭ la revolucia popolo intencante restaŭri kapitalismon en Ĉinio. Kompreneble la Partio kaj la tuta popolo devas rebati ilin. En sia longa batalo la ĉina popolo vidis, ke estas socialismo kiu savas Ĉinion. La ĉina popolo volas socialismon sed ne kapitalismon.

La nuna batalo kontraŭ la reviziisma linio estas farata dekomence sub la gvido de la diversnivelaj partiaj organizoj. Ĝi akcelas la studon de la tuta popolo pri Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso, altigas la konscion de la okcent milionoj da popolanoj pri daŭrigo de la revolucio en socialisma socio, stimulas ilian aktivecon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, akcelas la disvolviĝon de politiko, ekonomio kaj kulturo, akcelas la stabilecon kaj unuiĝon, pliapaŝe firmigas la diktaturon de la proletaro kaj ebligas al Ĉinio plue venke antaŭenmarŝi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

Tre bona estas la nuna situacio de la tuta Ĉinio kaj profunde disvolviĝanta estas la nuna batalo.

*La laboristoj de Giangnan-ŝipfarejo de Ŝanhajo kritikas per dazibaŭoj la tezon "preni la tri instrukciojn kiel la ĉefĉeneron".*



ĴEN GUO:

# Kritikado de "Akvorando" en Ĉinio

*Akvorando* estas ĉina klasika romano priskribanta kamparanan insurekcion en la lastaj jaroj de la dinastio Norda Song (960-1127 p.K.). La aŭtoro titolis sian romanon *Akvorando* ŝajne pro tio, ke Liangŝan-monto, la bazo de la kamparana insurekcio en la romano, situas ĉe lago.

En pli ol 600 jaroj post sia publikiĝo *Akvorando* cirkulis tre vaste kaj havis grandan influon. Kio estas ĝia ĉefa tendenco? Ĉu ĝi estas bona verko prikantanta la kamparanan insurekcion aŭ negativa instrumaterialo propagandanta kapitulacismon? Ĉu ĝia heroo Song Giang estas revoluciisto aŭ kapitulacisto? Multaj kritikoj antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio preskaŭ ĉiuj estis eraraj pri tiuj principaj demandoj.

Nun la laboristoj, kamparanoj, ĈPLA-anoj, kadroj, lernantoj kaj loĝantoj de la tuta Ĉinio legas kaj kritikas la romanon. Iliaj nemalmultaj bonaj kritikaj artikoloj publikiĝis en gazetoj kaj ĵurnaloj de diversaj lokoj. La grandskala kaj amasa kritikado pri tiu romano kun vasta influo havas tre gravan signifon.

La kritikado estis komencita en la pasinta aŭtuno laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ.

En sia ĉefartikolo titolita per "*Disvolvi kritikadon pri 'Akvorando'*" de la 4-a de septembro, 1975, *la Popola Ĵurnalo* diris: "Lastatempe Prezidanto Maŭ montris: **'La merito de la libro** ***Akvorando*** **kuŝas ĝuste en la priskribado de kapitulaco. Ĝi servas kiel negativa instrumaterialo**



*La laborista teoria grupeto de Hinhua-a Presejo de Pekino komentarias "Akvorandon".*

**por helpi la popolon rekoni kapitulacistojn.'** Prezidanto Maŭ diris ankaŭ: '*Akvorando* **oponas kontraŭ nur koruptaj oficistoj, sed ne la imperiestro. Ĝi ekskluzivas Ĉaŭ Gaj el la 108 personoj. Song Giang antaŭen puŝas kapitulacismon, praktikas reviziismon, ŝanĝas Gjuji-halon de Ĉaŭ Gaj en Ĝongji-halon kaj akceptas proponon pri amnestio kaj varbado. La batalo inter Song Giang kaj Gaŭ Kiu estas batalo de unu partio kontraŭ alia interne de la bienula klaso. Tuj post sia kapitulaco Song Giang iras batali kontraŭ Fang La.'** "

Prezidanto Maŭ profunde malkovris la esencon de *Akvorando* pri propagando de kapitulacisma linio kaj malkaŝis la veran vizaĝon de Song Giang, kiu praktikas reviziismon kaj kapitulacismon.

En *Akvorando* Ĉaŭ Gaj estas iniciatinto de la kamparana insurekcio de Liangŝan. Li deklaras la revolucian linion "kolekti justamajn bravulojn por unuanime batali kontraŭ la imperiestro de Granda Song". Sed la aŭtoro en sia verko lasis lin morti je sagotrafo en iu batalo kaj ekskluzivis lin el la 108 ĉefoj de Liangŝan kaj metis Song Giang en la unuan lokon de Liangŝan.

Song Giang originas el bienula klaso, kaj trovas neniun elirejon ol suriri Liangŝan-monton por partopreni en la insurekcia armeo pro la kontraŭdiro inter li kaj Gaŭ Kiu, korupta altrangulo kaj lakeo de la imperiestro. Post sia surmontiĝo, li faras multajn intrigojn por bati revoluciulojn kaj varbi renegatojn kaj perfidulojn. Post la morto de Ĉaŭ Gaj li uzurpas la gvidantecon de la insurekcia armeo kaj ŝanĝas Gjuji-halon de Ĉaŭ Gaj en Ĝongji-halon por praktiki kapitulacisman linion. Gjuji signifas unuanime leviĝi por insurekcio kaj revolucio, dum Ĝongji signifas fideli al la imperiestro de Granda Song, akcepti proponon pri amnestio kaj varbado kaj kapitulaci. La revizio farita de Song Giang al la insurekcia linio de Ĉaŭ Gaj signifas perfidon al la kamparana revolucio. En tiu senco li praktikas reviziismon. Song Giang fine akceptas la proponon de la imperiestro pri amnestio kaj varbado, kaj iniciate petas imperiestran ordonon por bati alian kamparanan insurekcian armeon gvidatan de Fang La. La aŭtoro de *Akvorando*

prikantis ĝuste reviziisman kaj kapitulacisman linion de Sọng Giang.

Rilate al tiu verko, kiu servas por subpremi kamparanan revolucion kaj protekti reakcian regadon de feŭda dinastio, la pioniro de la ĉina kultura revolucio Lusin faris, en sia artikolo *Ŝanĝiĝo de friponoj* publikigita en januaro de 1930, jenan profundan kritikon:

"*Akvorando* faras tion tre klara, ke ĉar ili ne batalis kontraŭ la imperiestro, ili tuj akceptis la proponon pri amnestio kaj varbado, kiam alvenis la registaraj trupoj, kaj iris batali kontraŭ aliaj banditoj por la ŝtato — banditoj kiuj ne 'praktikis justecon por la Ĉielo'. Ili estis lakeoj finfine."

Tamen en longa periodo granda kvanto da kritikoj de la kulturaj rondoj pri *Akvorando* preskaŭ ĉiuj estis kontraŭaj al la aserto de Lusin. Ili beligis kaj eĉ prikantis la kapitulacisman linion de Song Giang aprobitan de la libro. Unu el iliaj fundamentaj vidpunktoj estis: La kapitulaco de Song Giang estas kaŭzita de "limigiteco de kamparanoj" kaj tio, ke la kamparana insurekcio oponas kontraŭ nur koruptaj oficistoj, sed ne imperiestro, kontraŭ individuaj bienuloj, sed ne feŭda regpotenco kaj akceptas proponon pri amnestio kaj varbado, estas "decidita de la historiaj kondiĉoj" kaj ne devas esti rigardata kiel "perfido al revolucio". Tiu aserto konfuzis la principan limon inter la du kontraŭstarantaj klasoj kamparana kaj bienula kaj inter la du linioj de persistado en kamparana insurekcio kaj persistado en kapitulacismo kaj pravigis fakte la kapitulacisman linion.

La kamparanaj insurekcioj en la historio leviĝis unu post alia, faris neflekseblajn kaj furiozajn fortegajn atakojn al la regado de la bienula klaso, puŝis antaŭen la historion kaj manifestis revolucian spiriton de la ĉina kamparanaro. Sed tiam estis nek nova klasa forto, nek progresema partio, ili ne povis starigi novan sistemon kaj malvenkis senescepte. Kvankam la bataloj malvenkis, tamen ili batis la feŭdan regadon kaj iagrade akcelis la disvolviĝon de la sociaj produktaj fortoj. Malvenko ne signifas kapitulacon. Kapitulaco al la feŭda reganta klaso estas fiago de perfiduloj kaj lakeoj. Neniom da simileco estas inter malvenko post malcedema batalo kaj kapitulaco por fariĝi altrangulo! Kvankam la kamparana klaso havas ian kaj alian limigitecon, tamen neniom da tiu pri kapitulaco al la feŭda reganta klaso!




*La laborista teoria grupo de la Pekina Aŭtofabriko okazigis ekspozicion de komentario pri "Akvorando".*

Ĝuste tiuj gravaj demandoj estas tuŝitaj de la vasta popolo en la nuna kritikado de *Akvorando*.

Nun strikte ligante realan batalon inter la du klasoj kaj la du linioj, la ĉina popolo pluapaŝe serioze studas la instrukcion de Prezidanto Maŭ pri kritikado de *Akvorando*, faras kritikadon de *Akvorando* laŭ marksisma vidpunkto kaj per metodo de klasa analizo. Tio havas ne nur gravan signifon por la studo pri klasika literaturo kaj la kritikado kaj laboro de la tuta literaturo kaj arto, sed ankaŭ grandan realan signifon kaj profundan historian signifon por la Komunista Partio de Ĉinio kaj la ĉina popolo en ilia distingado de la ĝusta linio disde la erara kaj en rekonado de kapitulacistoj en komplika batalo, en ilia persistado pri la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, en oponado kontraŭ kaj preventado de reviziismo por firmigi la diktaturon de la proletaro.

Por disvolvi kritikadon de *Akvorando*, la koncernaj fakoj de Ĉinio denove presis kaj eldonis la libron.

La romano havas variantojn de 100, 120, 70 kaj 71 ĉapitroj. Sur reakcia starpunkto Gin Ŝengtan redaktis post forhako la varianton de 100 ĉapitroj en tiun de 70 ĉapitroj en la fino de Ming-dinastio (1368-1644). La varianto de 70 ĉapitroj forstrekis tion, ke Song Giang akceptas la proponon pri amnestio kaj varbado kaj batalas kontraŭ Fang La, kaj aliajn gravajn okazaĵojn. Lusin tre malkontentis pri tio kaj en sia artikolo *Pri Gin Ŝengtan* li montris, ke forstreko de tiu parto el la libro perdigis "al la originalo verecon", kaj diris metafore, ke tiu varianto estas "libelo kun rompita abdomeno".

La nunaj variantoj inkluzivas tiun de 120 ĉapitroj. Tio povas helpi pli multajn legantojn koni la tutan kapitulacan proceson de Song Giang, resumi historian sperton el tiu negativa instrumaterialo kaj rekoni kapitulaciston.




*La laborista teoria grupeto de la Tria Fotoaparata Fabriko de Ŝanhajo komentarias "Akvorandon" kaj kritikas kapitulacistojn per dazibaŭoj.*

LONG LIN:

# Hijang—Daĝaj-tipa gubernio


EN la vasta kamparo de Ĉinio, vigle disvolviĝas la revolucia amasa movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo kaj ĝeneraligo de Daĝaj-tipa gubernio. Ĉi tie ni prezentas al niaj legantoj Hijang — la unuan Daĝaj-tipan gubernion de Ĉinio.

Hijang-gubernio situas ĉe la okcidenta piedo de Tajhang-montaro kaj ĉ. 400 km. fore sudokcidente de Pekino. Antaŭ 9 jaroj oni venis al Hijang por pririgardi nur Daĝaj-brigadon. Sed nun, ĉiuj kiuj alvenis tien por viziti Daĝaj, ankaŭ volas rigardi la novan fizionomion de la tuta Hijang por lerni de ĝi sperton en disvolvado de lernado de Daĝaj.

Vizitantoj ofte elmetis jenajn demandojn: Kial okazis tiel granda ŝanĝo al Hijang en la Granda Proleta Kultura revolucio kaj kiel ĝi fariĝis Daĝaj-tipa gubernio?

*La gvidantoj de la partia komitato de Hijang-gubernio faras planon por reformi la naturon de la tuta gubernio.*





*La partia filio de Daĝaj gvidas la komunumanojn en senĉesa kritikado kontraŭ reviziismo kaj kapitalismo.*

## SERIOZAJ LECIONOJ

Hijang-gubernio konsistanta el 20 komunumoj havas 210,000 loĝantojn kaj pli ol 26,000 hektarojn da agroj. En la pasinteco ĝiaj agroj estis sterilaj. En la kvindekaj jaroj la popolanoj de Hijang sub la gvido de la Kompartio aktive suriris la vojon de agrikultura kooperigo, pli rapide disvolvis produktadon sinapogante sur la propraj fortoj kaj en 1958 akiris plej bonan rikolton en la historio, la totala produktokvanto de greno atingis 50,000 tunojn. Sed post 1960 ĝia agrikultura produktado stagnadis, kaj en 1966 ĝia totala produktokvanto de greno malpliiĝis ĝis 40,000 tunoj. Kial do? Ĉar la gubernio estis influata de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. La ĉefaj gvidantoj de la tiama gubernia partia komitato de Hijang ne sciis ke klasbatalo ankoraŭ ekzistas en la kamparo kaj oni ankoraŭ devas daŭrigi la revolucion. Anstataŭ gvidi la amasojn al bojkotado de kaj oponado kontraŭ tiu erara linio, ili ĝin plenumis aktive. Ekzemple, ili instigis kamparanojn kulturebligi malgrandajn virgajn parcelojn por propra uzo, fiksis produktan kvoton bazitan sur grupeta mastrumado, disdonis tirbrutojn de la kolektivo al individuaj familioj por bredado, permesis starigon de libera foiro kaj spekuladon, uzuradon, liberan dungadon, liberajn vendon kaj aĉeton de tero k. s. Tiu reviziisma linio adaptiĝis nur al bezono de la bienuloj kaj kulakoj en restaŭro de kapitalismo kaj ĝojigis parton de riĉaj kamparanoj, kiuj deziris riĉigi sian propran familion. Sed ĝi batis la socialisman aktivecon de la vasta komunumanaro kaj neeviteble kaŭzis reduktiĝon de la agrikultura produktokvanto.

Male de tio, la komunumanoj de Daĝaj-brigado firme kredis, ke **"nur socialismo povas savi Ĉinion"**. Sub la gvido de la partia filio ili persiste prenas klasbatalon kiel ĉefĉeneron, firme iras la socialisman vojon, faris senlacan batalon kontraŭ subfosado de la klasaj malamikoj kaj diversaj kapitalismaj tendencoj, diligente faris fundamentan konstruadon de kampoj kaj venkis seriozajn naturajn katastrofojn kun penlaboremo sinapogante sur la propraj fortoj, kaj per tio firmigis kaj disvolvis la kolektivan ekonomion. En 1964, kiam Prezidanto Maŭ faris la alvokon **"lerni de Daĝaj en agrikulturo"**, la hektara produktokvanto de greno de Daĝaj jam atingis pli ol 6,000 kg., sed tiu de la aliaj lokoj de la gubernio estis nur 1,680 kg. Tamen la gvidantoj de la tiama gubernia partia komitato ne serĉis la kaŭzon de tio en la batalo inter la du linioj, ili ankoraŭ rigardis Daĝaj nur kiel tipon de alta produkto kaj disvastigis en la gubernio nur iujn kultivajn teknikojn de Daĝaj.

Tiu eraro daŭris ĝis 1967, kiam ardis la Granda Proleta Kultura Revolucio. En tiu jaro fondiĝis la gubernia revolucia komitato estrata de Ĉen Jongguj, kiu antaŭe estis sekretario de la partia filio de Daĝaj-brigado, kaj nur tiam Hijang komencis suriri la vojon de lernado de Daĝaj.

## IRI LA VOJON DE DAĜAJ

Por resumi la sperton kaj ĉerpi historian lecionon, la gvidantoj de la gubernio komparis kaj analizis la du tipojn de la brigadoj Daĝaj kaj Vugiaping en la kadra kurso starigita en Daĝaj.

Vugiaping-brigado estas najbara tuj al Daĝaj. En la pasinteco ĝi kaj Daĝaj apartenis al sama altgrada agrikultura produkta kooperativo. Vugiaping estas vilaĝo pli granda ol Daĝaj, ĝiaj loĝantoj estis pli multaj kaj ĝiaj agroj pli bonaj. Parto de ĝiaj membroj ne aprobis la socialisman vojon iratan de la Daĝaj-anoj por komuna riĉiĝo, laŭ ili la kuniĝo de la vilaĝoj malprofitigis al ili, ankaŭ bienuloj kaj kulakoj agitis en tio, tiel ke en 1957 la kooperativo de la du vilaĝoj dividiĝis en du kooperativojn. De tiam, Daĝaj sub la gvido de Ĉen Jongguj progresis laŭ la socialisma vojo dum Vugiaping komencis regresi. Tiutempe la kadroj de tiu brigado anstataŭ gvidi la amasojn al fundamenta konstruado de kampoj, entuziasme sin okupis pri flankokupoj kaj anstataŭ bone irigi agrikulturon faris liberan komercadon. Ili restis inertaj, kiam iuj faris spekuladon kaj laŭvole grandigis sian memmastrumatan kampon. Utiligante feŭdan parencan koncepton bienuloj kaj kulakoj de la vilaĝo agitis kadrojn kaj amasojn de malsamaj domoj al malakordiĝo. Pro tio la produktado de la brigado malboniĝis jaron post jaro. En la komenco post ĝia disiĝo de Daĝaj la hektara produktokvanto de greno estis 2,250 kg., kaj post 8 jaroj tiu de Daĝaj leviĝis ĝis 6,000 kg. dum tiu de Vugiaping reduktiĝis ĝis 1,800 kg.


Per komparo de la du ekzemploj la nova gubernia partia komitato fondita en la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la vastaj amasoj klare vidis ke la radikala kaŭzo de la postiĝinteco de Vugiaping kaj la tuta gubernio kuŝas en tio ke ili plenumis eraran linion. De tio ili ekhavis novan konon pri la sperto de Daĝaj, ke ĝi ĉefe estas tipo de persistado en la fundamenta linio de la Partio, de rezoluta irado de la socialisma vojo kaj de disvolvo de la kolektiva ekonomio, sed ne "tipo de produktado". La fundamenta linio ellaborita de Prezidanto Maŭ por la Komunista Partio de Ĉinio en la tuta historia periodo de socialismo montris: **"La socialisma socio estas sufiĉe longa historia periodo. En tiu periodo ankoraŭ ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, ekzistas batalo inter la du vojoj de socialismo kaj kapitalismo kaj ekzistas danĝero de restaŭro de kapitalismo."** La praktikoj de Daĝaj kaj Vugiaping pruvis per pozitiva kaj negativa ekzemploj, ke la revolucio kaj produktado disvolviĝas senĉese, se oni persistas en la fundamenta linio de la Partio; forlasinte tiun linion, oni trafas perdon kaj malsukceson.

De tiam, en la tuta Hijang-gubernio disvolviĝis revolucia amasa movado de lernado de Daĝaj, kritikado kontraŭ reviziismo kaj kapitalismo kaj energia konstruado de socialismo. Vugiaping fariĝis la unua avangarda brigado de la tuta gubernio en lernado de Daĝaj kaj ankaŭ aliaj postiĝintaj komunumoj kaj brigadoj ŝanĝi-

ĝis rapide, inter kiuj Ŝiping-brigado estas elstara ekzemplo.

Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, kapitalisma tendenco estis relative serioza en Ŝiping-brigado sub influo de la reviziisma linio. Opiniante ke Ŝiping malfacile riĉiĝos pro malbonaj naturaj kondiĉoj, iuj iris al proksimaj urboj por fari liberan komercadon. Pro manko de bona kultivado kaj sterko, ĝiaj deklivaj agroj estis serioze detruitaj de akvo kaj la greno produktita ne sufiĉis por la konsumo de la loĝantoj, tiel ke la vivo de plejparto de la kamparanoj boniĝis ne multe.

*En la lastaj tri jaroj Hijang suferis de serioza sekegeco, jen komunumanoj vektoportas akvon el cisterno por akvumi plantojn.*



En la movado de lernado de Daĝaj, la gubernia partia komitato prenis tiun brigadon kiel unu el tiuj brigadoj al kiuj ĝi devas doni apartan atenton. La sekretario de la gubernia komitato Ĉen Jongguj alvenis por helpi ĝin en resumado de la historia sperto kaj mobilizado de la amasoj al kritikado de kapitalismo kaj al arda socialisma konstruado. La revolucia kritikado edukis la kadrojn kaj amasojn kaj firmigis ilian socialisman direkton. Per penlaborado de 5 jaroj ili konstruis du etajn akvokonservejojn, elektran pumpstacion, ŝtonajn akveduktojn kun longeco de 7,200 metroj sur 4 rivervaloj, sur kiuj oni konstruis pli ol 30 hektarojn da agroj. Krome oni reformis la malnovajn agrojn en bonajn kampojn kiuj povas konservi akvon, sterkon kaj grundon. Ĝia totala produktokvanto de greno en 1975 preskaŭ 6-obliĝis kompare kun tiu en 1966. En la lastaj jaroj ĝi ĉiujare liveris al ŝtato pli ol 500 tunojn da greno. Krom la porcioj por la komunumanoj, la kolektivo ankoraŭ rezervas pli ol 300 tunojn da greno. La komuna akumulo kaj la enspezo de la komunumanoj kreskas pluroble. Oni ankaŭ konstruis tute novan domaron por plibonigi la loĝkondiĉon de la komunumanoj.

En la lastaj 9 jaroj, per disaŭdigo, politikaj vesperlernejoj, artaj kaj literaturaj propagandoj, la partia komitato de Hijang-gubernio senĉese faris al la komunumanoj en ligo kun la aktualaj bataloj edukon pri klasbatalo kaj komparadon de la nova kaj malnova socioj, por ke ili pli amu socialismon kaj pli malamu kapitalismon. En 1972, kiam la gubernio suferis de sekegeco nevidita eĉ en cent jaroj, la kadroj kaj amasoj sub la gvido de la gubernia partia komitato persistis en lernado de la revolucia spirito de Daĝaj-anoj sinapogi sur la propraj fortoj kaj peneme lukti kontraŭ katastrofoj. Ili tage batalis kontraŭ sekegeco kaj vespere faris revolucian kritikon. En la tuta gubernio aperis varma sceno: Ju pli granda estis la sekegeco, des pli ardiĝis la labora entuziasmo de la komunumanoj. Dank' al tio oni akiris riĉan rikolton en la sekega jaro. El tio la popolo de Hijang refoje vidis la ĝustecon de la vojo irata de Daĝaj.

*Sekretario de la partia filio de Daĝaj Guo Fenglian intime babilas kun komunumanoj dum laborpaŭzo.*



## RADIKALA ŜANĜIĜO DE PRODUKTAJ KONDIĈOJ

Ekde la movado de lernado de Daĝaj, la gubernia partia komitato de Hijang jam vidis ke por konstrui socialisman agrikulturon, oni devas radikale ŝanĝi la produktajn kondiĉojn. Por ellabori projekton de la tuta gubernio pri reformado de naturaj kondiĉoj, ili trairis ĉiujn komunumojn kaj brigadojn. Antaŭ ili prezentiĝis sennombraj kalvaj montoj kaj ŝtonozaj riverbordoj. Kompreneble estas malfacile ŝanĝi tiajn naturajn kondiĉojn. Sed el la granda ŝanĝiĝo de Daĝaj, ili vidis luman estontecon. Antaŭ la kooperigo la natura fizionomio de Daĝaj estis miniaturo de la gubernio. Sed la nuna Daĝaj jam portas novan veston. El tio ili konkludis, ke laŭ la vojo de Daĝaj, oni certe povas ŝanĝi la naturajn kondiĉojn kaj disvolvi agrikulturon. Nannaŭ-brigado estas bona ekzemplo pri tio.

Tiu brigado situas sur alta monto, kie multas ŝtonoj kaj estas maldika tavolo de sterila grundo. Ĝi estis unu el la vilaĝoj kun plej malbonaj naturaj kondiĉoj. En 1967, ĝi komencis lerni de Daĝaj kaj kritiki reviziismon kaj kapitalismon por konstrui novan Nannaŭ. Ĝi finkonstruis surmontan ŝoseon, tiel ke la vilaĝo estas atingebla per aŭto. Ĝi starigis alttensian linion de 2,000 metroj, kiu ebligis al la komunumanoj uzi elektron por lumigado kaj prilaborado de greno. Ili kreis sur ŝtonoj altproduktajn kampojn, la totala produktokvanto de greno rapide kvarobliĝis.

La ŝanĝiĝo de Nannaŭ donis grandan inspiron al la gubernia partia komitato. Ili decidis komenci alian pli grandan konstruadon — konstrui 200 hektarojn da kampoj sur la riverbordo de Giedu per movo de 480,000 kubmetroj da tero kaj ŝtono, por doni modelon en lernado de Daĝaj. Sub la gvido de la gubernia partia komitato, la konstruantoj-komunumanoj kun senprecedence granda entuziasmo venkis froston, inundakvon kaj diversajn malfacilojn kaj finis la konstruadon antaŭdate je duonjaro.

La sukceso de la konstruado multe kuraĝigis la tutan gubernion. Ĝi estis granda sukcesa ekzercado de la popolo de Hijang en reformado de malbonaj naturaj kondiĉoj. Ĝi liberigis la



*Konstruantoj de la plej granda akvoutiliga konstruaĵo en la tuta gubernio por konduki akvon de la okcidento orienten.*

La kadroj de Daĝaj bone diris: "La rapida veturado de trajno tute dependas de la lokomotivo." Frue en la komenca periodo de kooperigo, la partia filio de Daĝaj starigis por si tri regulojn: ne esti egoisma, ne postuli apartan favoraĵon kaj persisti en partopreno de kolektiva produkta laboro. En la pasintaj jaroj ili ĉiam rigore observis tiujn regulojn. Ilia spirito de sentimo al malbonaj kondiĉoj kaj malfaciloj, senregreso antaŭ sukcesoj kaj honoro, senkonfuziĝo antaŭ hereza vento estas multe laŭdataj de la amasoj. En la lastaj jaroj ili ofte okazigis stilreĝustigan kunvenon en kiu ili publike faris memkritikon antaŭ la partianoj kaj nepartianoj, kaj petis de ili kritikon. Ili ankaŭ aktive partoprenas en fizikaj laboroj. Ĉiufoje, kiam la 29-jara partifilia sekretario Guo Fenglian revenis al sia brigado post ĉeestado de kunveno en alia loko, ŝi ĉiam tuj iras al kamplaboro, se nur tio ankoraŭ daŭras. Ŝi diris: "Sen partopreno en fizika laboro, la amasoj ja ne konas min, kaj mi ne konas ilin. Tiamaniere la amasoj ne povas bone fari al mi kontrolon kaj edukon kaj mi ne scias kion mi devas fari."

La ago de la kadroj de Daĝaj starigis modelon por la kadroj de la tuta gubernio. En la pasintaj 9 jaroj la guberniaj kadroj diligente lernis Marksismon-Leninismon, persistis en kritiko kontraŭ kapitalismo kaj en energia konstruado de socialismo, intime interrilatiĝis kun la amasoj, aktive partoprenis en kolektiva produkta laboro kaj ludis rolon de "lokomotivo" en diversaj laboroj. La sekretario de la gubernia partia komitato Ĉen Jongguj nun estas membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Kvankam li estas tre okupata, sed ĉiam tenas striktan ligiĝon kun la amasoj kaj partoprenas en fizika laboro. Ĉiufoje, kiam li revenis al la gubernio por kontroli laborojn, li ĉiam vivas kaj fiziklaboras inter la amasoj. Sub la influo de lia ekzemplo la aliaj gvidantoj disvolvis la revolucian entuziasmon montritan dum la militaj jaroj. Ili ĉiam

penson de la popolanoj kaj vidigis al ili la grandan forton de la kolektivo. En la tuta gubernio rapide leviĝis varma tajdo por reformi la naturon: Iuj brigadoj konstruas ŝtupajn kampojn, aliaj transformas ŝtonozajn riverbordojn en bonajn kampojn, triaj kreas ŝtupajn kampojn en valo, kaj kvaraj plenigas valojn kaj formovas montojn por formi ebenaĵojn, ja ĉie iras konstruado. En la pasintaj 9 jaroj ili faris multajn aferojn, kiujn la antaŭuloj kuraĝis nek pensi nek entrepreni, kaj per tio multe ŝanĝis la fizionomion de Hijang. Nun 80% de la agroj de la gubernio jam fariĝis bonaj. De 1966 ĝis 1975, la totala produktokvanto de greno leviĝis de 40,000 tunoj al pli ol 150,000 tunoj, la hektara produktokvanto pliiĝis de 1,680 kg. al pli ol 6,000 kg., la grena kvanto liverita de ĝi al la ŝtato leviĝis de 4,000 tunoj al 50,000 tunoj kaj la totala enspezo de ĝiaj agrikulturo, forstumado, brutobredado kaj flankokupoj pliiĝis de pli ol 14,000,000 juanoj al pli ol 48,000,000 juanoj. La faktoj de Hijang elokvente pruvis, ke la vojo de Daĝaj estas nepre irota vojo por multe, rapide, bone kaj ŝpare disvolvi grandan socialisman agrikulturon.

## ROLO DE "LOKOMOTIVO"

La granda progreso de Hijang estas nedisigebla de la modelaj kondutoj de la kadroj.

prenas al si pezan kaj malfacilan laboron por la Partio kaj la popolo ne konsiderante sian ripozon. Iuj gvidantoj kun malforta korpo ankoraŭ persistas en fizika laboro kune kun la amasoj. La vicsekretario de la gubernia partia komitato Vang Ginzi ofte faras tage enketadon kaj esploron en la kamparo kaj vespere laboras en la oficejo.

La partopreno de kadroj en fizika laboro jam fariĝis sistemo. Ĉiujare la guberniaj kadroj devas partopreni en fizika laboro dum 100 tagoj, la komunumaj kadroj dum 200 tagoj, kaj la brigadaj kadroj dum 300 tagoj. Fizika laborado jam fariĝis ilia kutimo. La guberniaj institucioj praktikas sistemon, laŭ kiu triono de la kadroj iras al bazaj unuoj por fari enketadon kaj esploron kaj partopreni en fizika laboro, alia triono iras al produktaj taĉmentoj kaj fiziklaboras kiel ordinaraj komunumanoj kaj la lasta triono restas en la institucioj por persisti en duontaga oficlaboro kaj duontaga fizika laboro. Ili opinias ke tio estas utila por elimini burokratismon kaj preventi reviziismon kaj dogmismon.

En la lastaj jaroj la gvidantoj de la komitato serioze studis la teorion de la diktaturo de la proletaro kaj pli profunde konis ke oni devas krei kondiĉojn por ricevi kontrolon de la amasoj por ke la guberniaj gvidaj kadroj fariĝu veraj popolaj servantoj. Ili invitis kadrojn kaj komunumanojn de bazaj unuoj, kiuj kuraĝas diri siajn opiniojn, al la guberniaj institucioj por ke ili partoprenu en la institucia laboro dum certa tempo, kaj poste prezentu siajn opiniojn pri la laboro de la gubernia institucio. Krome ili okazigas kunvenon de diversnivelaj kadroj kaj amasoj por mobilizi ĉiujn kunvenantojn malkaŝi mankojn kaj problemojn en la laboroj de la gubernia partia komitato. Ĉiujare la membroj de la komitato iras al kamparo por fiziklabori kiel ordinaraj komunumanoj dum unu monato. Ĉar ili bone akceptis opiniojn de la amasoj kaj koncentris saĝon de la amasoj, ĉiuj iliaj laboroj estas bone plenumitaj. Nun la kadroj de la tuta gubernio kun alta entuziasmo klopodas por pli bone konstrui Hijang kune kun la amasoj.

*Kinŝan-akvokonservejo en konstruado*





*Gaŭluo-brigado ensakiĝas grandan kvanton da greno por vendi ĝin al la ŝtato.*

# Hijang kun nova fizionomio

de **GI GANG**

EN januara Tajhang-montaro estas tiel malvarmege, ke akvogutoj glaciiĝas tuj post falo sur la teron. Tamen kiam ni venis al Hijang en tiu tempo, ni vidis, ke tie iras entuziasma konstruado: tondras mineksplodoj sub rokmuroj, laŭte bruas buldozoj en valoj, vigle laboras homoj kaj rapidas veturiloj sur la konstruejoj. La heroa popolo de la tuta gubernio estis konstruanta "malgrandajn ebenaĵojn" en montregiono kaj transformanta malgrandajn ŝtupajn kampojn en grandajn parcelojn por krei kondiĉojn necesajn por efektivigi meĥanizadon, irigaciadon kaj ĝardenigon de agrikulturo.

De post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo de Hijang kun obstina batalspirito senĉese novigas la fizionomion de tiu gubernio en la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo.

## REARANĜO DE LA MONTOJ KAJ RIVEROJ

Kiam ni ascendis la faman Hutoŭ-monton, aperis antaŭ niaj okuloj impone bela vidaĵo: sub la piedoj kuŝas ŝtupaj kampoj, ĉe la fundo de la valoj etendiĝas malgrandaj ebenaĵoj, kaj malproksime post la baraĵo sur Songhi-rivero fluanta nordorienten ebenas fekundaj kampoj. La akompananto diris al ni: "Se vi venos en aŭtuno, vi vidos scenon de riĉa rikolto: oraj ondoj ruliĝas en la ŝtupaj kampoj kaj rizplantoj aromas sur ambaŭ bordoj de la rivero."


Post momenta medito li daŭrigis: "Por aliaj tio estas nemirinda, tamen por la aĝuloj de Hijang tio estas mirakla ŝanĝo. Ĉar antaŭ la Liberiĝo tute alia estis la aspekto de Hijang: la montoj estis kalvaj, la valoj herboplenaj, la riverbordoj ŝtonozaj kaj la kampoj sur la mon-

todeklivoj malvastaj kiel manplatoj kiuj povis teni nek grundon nek sterkon nek akvon.

De jarcentoj la popolo de Hijang sopiris ŝanĝi la fizionomion de la malfavora naturo. Sed ĝi senrajta en la malluma malnova socio ne havis povon por venki la naturon. Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio la popolo de Hijang suriris la vojon de socialisma kolektivigo kaj la fizionomio de la naturo en la tuta gubernio komencis ŝanĝiĝi. Precipe la fama Daĝaj-brigado sub la gvido de la partia filio estrata de Ĉen Jongguj persistis en kritikado de reviziismo kaj kapitalismo kaj energia konstruado de socialismo kaj fariĝis ruĝa flago de la ĉina agrikulturo.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, la popolo de Hijang kritikis la krimojn de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kiuj antaŭenpuŝis reviziisman linion kun la vana espero restaŭri kapitalismon, levis revolucian amasan movadon de konstruado de Daĝaj-tipa gubernio sub la gvido de la nova partia komitato de la gubernio kaj tute novigis la aspekton de la naturo de Hijang.

Ĉe la valo Sandugoŭ ni vidis novan sukceson de la popolo de Hijang en transformado de la valoj. La nomita valo longas je 11 kilometroj. En la pasinteco, tie torentis inundakvo en pluvo kaj multis ŝtonoj sen pluvo. En la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la kadroj kaj amasoj de Sandu-komunumo decidis rearanĝi tiun valon. Ĉar mankis al ili sperto, la baraĵoj konstruitaj en vintro estis detruitaj de inundakvo en somero. La kadroj kaj komunumanoj tamen ne deprimiĝis. Ili diris: "Se la Daĝajanoj povis sukcese transformi la valon Langvoĝang, ankaŭ ni povos venki la valon Sandugoŭ!" Ili lernis metodon de alia brigado, konstruis arkan akvedukton sur la fundo de la valo kaj formis kampojn sur la akvedukto. Ili konstruis akvedukton longan je 11 kilometroj kaj ĉ. 47 hektarojn da kampoj. Kaj poste ili ankaŭ konstruis en la meza kaj supra partoj de la valo kaj sur ĝiaj branĉoj 7 malgrandajn akvokonservejojn kaj 16 basenojn kaj plantis arbojn sur la montoj ambaŭflanke de ĝi. Nun dank' al tiu aranĝo Sandugoŭ jam fariĝis irigaciata grenproduktejo imuna je inunda katastrofo. Hodiaŭ jam pli ol 3,000 valoj de Hijang estas tiel rearanĝitaj kiel Sandugoŭ. En la larĝaj kaj malprofundaj valoj konstruiĝis baraĵoj kaj kampoj; en la mallarĝaj profundaj valoj konstruiĝis akveduktoj, sur kiuj kampoj estis formitaj; kaj sur la montodeklivoj konstruiĝis ŝtupaj kampoj. La ŝtonarkaj akveduktoj kons-



*Novaj rizkampoj kreitaj de Vugiaping-brigado sur antaŭaj ŝtonozaj river-bordoj.*

truitaj en la gubernio por transformi valojn longas totale 76 kilometrojn.

En la baseno de Songhi-rivero, ni pririgardis akvoutiligajn konstruojn de la popolo de Hijang. Songhi-rivero estas relative granda kaj ĝi kaj ĝiaj 5 branĉoj alportis sennombrajn katastrofojn al la popolo de Hijang en la pasinteco. En pluva sezono, ĝi inundis kaj detruis kampojn kaj vilaĝojn. Post la Liberiĝo, oni konstruis digojn sur ĝiaj bordoj. Nur en la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, la popolo de Hijang vere enjungis tiun riveron. Hodiaŭ, ĉe iuj lokoj ĝia akvo devas kuri flanke laŭ ĝia fluejo por ke centoj da hektaroj da kampoj formiĝu sur la malnova fluejo; ĉe aliaj lokoj, ĝi fluas tra nove borita tunelo tra monto, por ke dekoj da hektaroj da kampoj formiĝu sur la forlasita kurba fluejo; kaj ĉe triaj lokoj konstruiĝis elektraj pumpstacioj, kiuj levas akvon sur monton por irigacii ŝtupajn kampojn. Laŭ statistiko pli ol 3,000 hektaroj da kampoj estas kreitaj en rearanĝado de tiu rivero.

En sia batalo kontraŭ la naturo, la popolo de Hijang fariĝis pli kaj pli kuraĝa kaj rimedoplena. En la pasinteco, ĝi konstruis ŝtonajn barajojn kaj kampojn en valoj per fosiloj kaj pioĉoj, sed nun ĝi fabrikis grandan kvanton da dinamito kaj agrikulturaj maŝinoj, per kiuj ili forigis montetojn kaj plenigis valojn por formi vastajn kampojn taŭgajn por kulturado per maŝinoj kaj rearanĝis riverojn kiuj alportadis katastrofojn. En la pasintaj 9 jaroj, ĝi forigis pli ol 150 montetojn, konstruis 159 mezajn kaj malgrandajn akvokonservejojn, irigaciebligis ĉ. dek mil hektarojn da kampoj kaj konstruis pli ol dudek mil hektarojn da kampoj de ĉiam alta produkto, kaj dank' al tio la totala produktokvanto de greno preskaŭ kvarobliĝis. La komunumanoj ĝoje diris: "Lernante de Daĝaj en agrikulturo kaj senĉese daŭrigante la revolucion laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ni akiris riĉajn rikoltojn en sinsekvaj jaroj."

## PROSPERA DISVOLVIĜO DE MALGRANDAJ INDUSTRIAJ ENTREPRENOJ

Dum nia vizitado en Hijang, ni vidis ke diversaj agrikulturaj maŝinoj ludas ĉiam pli grandan rolon en reformado de la naturo. Preskaŭ ĉiu brigado jam havas traktorojn, maŝinojn por semado, draŝado, ventumado kaj pecigado de fojno, muelmaŝinojn, pumpilojn, elektrajn motorojn ktp.


Industria administranto de la gubernio diris al ni, ke escepte de traktoroj, preskaŭ ĉiuj tiuj maŝinoj estas faritaj de fabrikoj de tiu gubernio. En la pasinteco, tiu gubernio povis fabriki nur malgrandajn agrikulturilojn, la ĉefaj laboriloj de la komunumanoj estis pioĉoj, ŝoveliloj kaj puŝĉaroj. Tre malmultaj grandaj agrikulturaj maŝinoj kiel traktoroj kaj buldozoj estis uzataj tie. Post la jaro 1967, la partia komitato de la gubernio mobilizis la amasojn, konstruis aŭ pligrandigis 23 fabrikojn kaj minejojn de agrikulturaj



*Ŝiping-brigado konstruis en ravino subteran akvedukton por dreni pluvakvon kaj sur ĝi kreis multajn kampojn.*

maŝinoj, cemento, kemisterko, giso, traktoroj kaj karbo, laŭ la bezono de la rapide disvolviĝanta konstruado de kampoj kaj la principo de konstruado de fabrikoj kun ŝparemo kaj la spirito de sinapogo sur propraj fortoj. La gubernia industriaj entreprenoj prospere disvolviĝis.

Por konstrui tiujn fabrikojn, la ŝtato investis nur 9,000,000 juanojn kaj la cetera parto de la kapitalo estis liverita de la gubernio. Kiam la cementa fabriko estis konstruita en 1967, ĝi havis nur du globmuelilojn kaj kelkajn malno-



*400-metra akvobarajo konstruita de Higubi-brigado*

vajn dispecigilojn. Tiam la laboristoj diris: "La komunumanoj lernas de Daĝaj, kaj ni ja devas frue produkti cementon por ilin subteni!" Ili klopodis por rapide fabriki necesajn ekipaĵojn kaj en malpli ol duonjaro la fabriko jam komencis produktadon.

La guberniaj fabrikoj tutforte subtenas la agrikulturan produktadon kaj produktas kion la lasta bezonas. Por liberigi laborfortojn en la kamparo, la fabriko de agrikulturiloj produktis maŝinojn por muelado, draŝado kaj dispecigado. Por akceli la disvolvon de porkobredado, tiu fabriko ankaŭ produktis maŝinojn por pulvorigi nutraĵojn por porkoj. Kiam okazis terura trosekeco en 1972, la fabriko de agrikulturiloj kaj la fabriko de elektraj motoroj urĝe faris grandan nombron da pumpiloj, elektraj motoroj kaj gisaj tuboj, dank' al kio multaj brigadoj, al kiuj mankis akvo delonge, konstruis elektran pumpstacion kaj starigis tubakvan sistemon. Por frue efektivigi meĥanizadon de agrikulturo en la montregiono, kelkaj fabrikoj kune formis fabrikon de traktoroj kaj produktis 10-ĉevalpovajn raŭpo-traktorojn taŭgajn por uzado en montregiono. En la pasintaj 9 jaroj, la guberniaj fabrikoj sukcese provfabrikis 21 novajn produktaĵojn kaj fabrikis 8,500 agrikulturajn maŝinojn kaj per tio forte subtenis la movadon de lernado de Daĝaj en agrikulturo.

La rapida disvolviĝo de la gubernia industrio movis la disvolviĝon de la industrio de kolektiva posedsistemo de la komunumoj kaj pretigis kondiĉojn por fortigi la kolektivan ekonomion kaj malgrandigi la diferencon inter la brigadoj. La enspezo de la komunuma industrio de Ligiaĝuang konsistigis 44 pocentojn de ĝia totala enspezo. La partia komitato de la komunumo decidis uzi parton de la enspezo de la komunumo por helpi la brigadojn, precipe tiujn kun malpli bonaj ekonomiaj kondiĉoj, en disvolvo de produktado. La komunumo difinis, ke la brigadoj kies produktado kaj enspezo estas malpliigitaj pro katastrofo kaj kies labortaga pago estas sub la normo, povas ricevi subvencion el la industria enspezo de la komunumo.

En la ekzemplo de Ligiaĝuang-komunumo oni povas vidi, kiel la komunumoj de Hijang subtenas agrikulturon per industrio. Nun ĉiu komunumo de la gubernio havas riparejon de agrikulturaj maŝinoj kaj ĉiu brigado riparan grupon de agrikulturiloj. La nombro de traktoroj, buldozoj kaj aliaj grandaj agrikulturaj maŝinoj de la gubernio grandiĝis je kelkdekoblo aŭ centoblo kompare kun tiuj de 1966 kaj la laboroj sur draŝejo kaj prilaborado de greno kaj agrikulturaj flankokupaj produktoj estas plejparte aŭ duone plenumitaj per maŝinoj.

## NOVAJ VILAĜOJ EN PROSPERO

Profundan impreson postlasis al ni nia vizito al Liuĝuang-brigado. Ĝi estas vilaĝo, tamen diferenca de la malnovaj vilaĝoj. En la centro de la vilaĝo sidas oficejo de la revolucia komitato de la brigado kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo troviĝas politika vespera lernejo, biblioteko, scienca esplorejo, klubo, butiko, infanĝardeno kaj lernejo. Vespere en tiuj lokoj komunumanoj aŭ lernas, aŭ legas librojn kaj ĵurnalojn, aŭ ludas literaturajn kaj artajn programerojn verkitajn de ili mem.

Ambaŭflanke de la larĝa strato staras tute novaj brikaj domoj kaj ŝtonaj kaverndomoj servantaj kiel loĝejoj de la komunumanoj.

Kiam ni vizitis la hejmon de maljuna malriĉkamparano Li Hinjuan, li diris al ni kun forta emocio: "Se ne estus la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, se ne estus la movado de lernado de Daĝaj en agrikulturo, ni ne povus havi tiel feliĉan vivon hodiaŭ!" Antaŭ la Liberiĝo, Li Hinjuan falis en ŝuldojn pro klopodo por konstrui por si domon. Li ne sukcesis konstrui domon, sed devis forvendi sian filinon kaj kampon por pagi ŝuldojn.

*La fabriko de agrikulturaj maŝinoj de Hijang produktis por la kamparo grandan kvanton da dizeloj.*



En la malnova Ĉinio multaj malriĉaj kamparanoj de Hijang, same kiel tiuj en la aliaj partoj de la lando, fariĝis dumvivaj labordungitoj de bienuloj pro ricevo de loĝkaverno aŭ kaduka kabano kiel loĝejo; multaj eĉ havis nenian loĝejon malgraŭ penlaborado. Post la Liberiĝo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiuj jam havas sian domon. Precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, ili persistas en kritiko kontraŭ reviziismo kaj irado de la socialisma vojo de kuna riĉiĝo, senĉese disvolvas la produktadon, pli kaj pli fortigas la kolektivan ekonomion kaj akiras ĉiam pli bonajn kondiĉojn de loĝado. Surbaze de garantio de disvolvado de la produktado kaj altigo de la enspezo de la komunumanoj, la komunumoj kaj brigadoj de Hijang uzis parton de sia enspezo por konstrui novan vilaĝon kaj disvolvi la kolektivajn aferojn de sanprotekto, kulturo kaj eduko kaj turnis la malnovajn vilaĝojn en novajn vilaĝojn prosperajn.

Tiuj novaj vilaĝoj konsistas aŭ el vicoj super vicoj da ŝtonaj kaverndomoj konstruitaj sur montodeklivo aspektantaj kiel etaĝdomegoj rigardate de malproksime, aŭ el domoj konstruitaj sur ŝtonarka tunelo aŭ el domoj kun blubrikaj muroj kaj ruĝtegola tegmento inter pinoj sur la supro de monto. Kun brilaj elektraj lampoj en nokto ili aspektas vere belaj.

Kiel la domoj estas distribuitaj al la komunumanoj? Iu kadro diris al ni, ke la komunumanoj povas elekti por si ŝatatan loĝejon inter kaverndomo kaj brika domo kaj por la loĝejo ĉiu familio pagas nur ĉ. 15 juanojn en ĉiu jaro. En tia nova vilaĝo jam instaliĝis tubakva sistemo. La kolektivaj staloj estas konstruitaj ekster la vilaĝo, la stratoj estas ofte purigataj kaj la necesejoj

estas prizorgataj de specialaj homoj. En la montregiono kie plagis epidemioj kaj mankis kuracistoj kaj kuraciloj en la pasinteco, nun ĉiu komunumo jam havas hospitalon kaj ĉiu brigado nudpiedajn kuracistojn, kaj koopera kuraca sistemo estas ĝenerale starigita. En la pasinteco, plejparto de la popolanoj de Hijang estis analfabetoj, sed nun senpaga mezlerneja edukado estas ĝeneraligita. Komunumanoj diris, ke nun ili ne plu bezonas zorgi pri manĝaĵo, loĝejo kaj vestoj kaj povas konstrui socialismon per sia tuta energio. Nun ili estas klopodantaj por radikale ŝanĝi la fizionomion de Hijang per senprecedence kreiva laborado.

HUA VEN:

# Novaj socialismaj kamparanoj


### POR LA KOLEKTIVO

En iu vespero sur la konstruejo de akvokonservejo en Hijang tondris eksplodaj bruoj. Post momento la konstruejo fariĝis silenta eksterordinare. Subite fortika junulo saltis el sia ŝirmejo kaj sin ĵetis al loko, kie la minoj estis metitaj. Ĉe la loko li trovis ke iu mino ne eksplodis kaj ĝia meĉo ankoraŭ brulas. Tiam pli ol 60 komunumanoj jam alrapidis post li kaj videble tuj okazos serioza akcidento. Kion fari? Spite al ĉio li sin ĵetis al la meĉo por ĝin eltiri. Sed li ne sukcesis. Li do kuŝiĝis sur la mino, kaptis la meĉon per la dentoj, ĝin eltiris tutforte, kaj per tio li malebligis la seriozan akcidenton.

La junulo nomiĝas Ĉen Ĵun-aŭ. Lia heroa ago kaj sindonemo estas multe laŭdata de la komunumanoj.

Hodiaŭ, en la kamparo de Hijang estas multaj kortuŝaj heroaĵoj kiel tiu de Ĉen Ĵun-aŭ. Tio montras, ke la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo ne nur ŝanĝas tieajn naturajn kondiĉojn, sed ankaŭ kulturas novtipajn socialismajn kamparanojn kiuj tutkore laboras por la kolektivo kaj la revolucio.

Komunumano Vang Daĝeng aliĝis al la revolucia vicaro jam en 1937, kiam eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito. En la militaj jaroj li



*Sekretario de Higubi-brigado Li Kimaŭ (maldekstre) kun la amasoj sub sia gvido hakas monton por ŝanĝi la fluejon de rivero.*

brave batalis, dufoje vundiĝis kaj faris meritojn por la popolo.

En 1942 Vang Daĝeng malmobiliziĝis kaj revenis al sia hejmloko. Firme tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"disvolvi la revolucian tradicion por akiri pli grandan honoron"**, li klopodas por fari novajn meritojn por la popolo. Li ankoraŭ pli entuziasmiĝis precipe en la movado de lerno de Daĝaj. En multaj jaroj li paŝtis bovojn por la kolektivo kaj neniam plendis pri malfaciloj. En kiom da noktoj li gardis novnaskitan bovidon en stalo kaj ĝin zorgeme manĝigis. Foje bovido estis elpelita de ŝtormo el la stalo kaj glitis en profundan basenon. Li brave saltis en la basenon, savis la bovidon kaj ĝin portis hejmen.

Li ofte pensas, ke li kiel komunisto devas dediĉi sian tutan forton al la revolucia afero. Ĉu en frosta vintro aŭ en varmega somero li ĉiam kunportas kun si korbon por kolekti bovfekaĵon dum paŝtado. Ĉiujare li kolektis por la kolektivo pli ol mil korbojn da bovfekaĵo.

La partia filio de la brigado multfoje laŭdis lin pro lia revolucia spirito de zorgo al la kolektivo kaj decidis doni al li certan rekompencon. Tamen tion li rifuzis kun dankemo. En la pasintaj jaroj li kolektis por la kolektivo milojn da korboj da sterko, tamen li postulis pro tio neniom da rekompenco.


Taĉmentestro Li Fulu estis elstara komunisto tutkore laboranta por la kolektivo kaj batalanta por la revolucio ĝis la lasta spiro. Printempe de 1974, kiam li kun komunumanoj sub sia gvido finplenumis iun akvoutiligan konstruadon, li subite falis en gravan malsanon. La ekzameno konstatis, ke li suferas de stomaka kancero de la lasta periodo. Gvidantoj kaj kamaradoj ĉiamaniere klopodis por kuracigi lin kaj samtempe konsolis kaj admonis lin ripozi. Eĉ en tia stato li diligente laboris kun obstina batalvolo por la revolucio. La kadroj ne asignis al li laboron, li do mem serĉis tion. Li ankoraŭ faris kune kun komunumanoj printempan plugadon kaj semadon sur kampoj. Kiam li ne kapablis labori sur kampo, li mortigis malutilajn birdojn per ĉaspafilo. Poste li tre malgrasiĝis kaj malfortiĝis kaj ĉiuj aliaj devigis lin ripozi. Tamen li senbrue trovis por si novan laboron: Ĉiutage li sidis ĉe rando de tritikkampo por gardi ĝin de atenco de kokoj. Kiam li ne povis moviĝi sur la lito, li ankoraŭ zorgis pri la taĉmento. Antaŭ sia morto li diris al la sekretario de la partia filio: "Mi jam mortos kaj povos fari nenion por la revolucio. Kvankam la naturaj kondiĉoj de nia loko estas relative malbonaj, tamen ni certe povos ŝanĝi la fizionomion de nia loko, se ni serioze lernos la fundamentan sperton de Daĝaj!" Li admonis siajn edzinon kaj gefilojn, ke ili aŭskultu vortojn de la Partio kaj donu bonajn ekzemplojn en la socialisma konstruado. Ĉiuj komunumanoj ĉeestantaj kortuŝiĝis ĝis larmoj kaj ili decidis lerni lian revolucian spiriton kaj pli bone konduki la movadon de lerno de Daĝaj.

## SUB LA KURAĜIGO DE LA SPIRITO DE LA MALSAĜA AVO

En la antikveco de Ĉinio en Tajhang-montaro, kie situas Hijang, cirkulis rakonto "Montotranslokado fare de Malsaĝa Avo". Tio estis nur revo de la laboranta popolo en venko super la naturo. Tamen hodiaŭ kuraĝigate de la spirito de la Malsaĝa Avo la popolo de Hijang reformas kalvajn montojn kaj realigas la belan revon de la antikvuloj.

Higubi-brigado situas sur la norda bordo de Songhi-rivero. La alta Ĝajling-monto sur ĝia suda bordo baris la vojon de la rivero kaj devigis ĝin kurbigi sian fluejon norden. Pro erozio de superakvo en multaj jaroj formiĝis tie riverkurbiĝo kun larĝeco de 500 metroj. En 1969, en la alta tajdo de lerno de Daĝaj la partia filio de la brigado ellaboris planon: trahaki Ĝajlingmonton, rektigi la fluejon de Songhi-rivero kaj krei pli ol 46 hektarojn da kampoj en la kurba fluejo. Kompreneble multegaj estis la malfaciloj por tiu produkta brigado havanta nur 200 virajn kaj virinajn laborfortojn por plenumi tiel grandan konstruadon por kiu oni bezonas movi 520,000 kubmetrojn da teraĵoj. Tamen la komunumanoj de tiu brigado diris: "Se la Malsaĝa Avo kaj liaj familianoj kuraĝis transloki la grandajn montojn Tajhang kaj Vangvu, ni certe kuraĝas trahaki Ĝajling." Informiĝinte pri tio ankaŭ la gvidantoj de la gubernia partia komitato alrapidis kaj kuraĝigis ilin: "Vi devas glorigi la socialisman patrolandon per via brava batalo por trahaki la monton kaj rektigi la riverfluejon!" Kaj sekve la konstruado komenciĝis.

Sub la gvido de la sekretario de la partia filio Li Kimaŭ, la komunumanoj kun alta batalvolo suriris la monton. Eĉ 7-8-jaraj geknaboj kaj 60-70-jaraj maljunuloj meminiciate alvenis por kontribui al la konstruado laŭ sia kapablo. Vintre malgraŭ vento kaj neĝo oni eksplodigis rokojn kaj forportis ŝtonojn; somere krom iuj komunumanoj, kiuj tagnokte penlaboris speciale sur la konstruejo, ankaŭ aliaj komunumanoj memvole iris tien por helpi post finplenumo de taga laboro. Oni laboris ne nur pene sed ankaŭ saĝe. Por rapidigi la transportadon de teraĵo kaj malpliigi la laborintensecon malriĉkamparano Li Zajjuan proponis transporti teraĵon per akvo, kio altigis la laborefikecon je 120-oblo. Kaj oni



*Virinoj de Nannaŭ-brigado energie konstruas kampojn.*

finplenumis la konstruadon en unu jaro kaj 8 monatoj anstataŭ 7 jaroj laŭ la plano.

La spirito de la Malsaĝa Avo kuraĝigas ankaŭ virinojn de Nannaŭ-brigado en reformado de la naturo. En la pasinteco pli ol 4,000 terpecoj de Nannaŭ oblikve pendis sur la montodeklivoj, inter kiuj la plej granda havis nur areon de malpli ol 1/15 hektaro. Post la aŭtuna rikolto de 1971 la partia filio de Nannaŭ ellaboris planon de transmovo de montoj por krei ebenaĵon laŭ la sperto de Daĝaj. La virinoj de la brigado akceptis taskon formovi malgrandan montpinton. Tiam iuj ne kredis pri iliaj fortoj. Tamen la virinoj diris: "Ni estas virinoj de la nova Ĉinio kaj kion la viroj povas fari, tion povas ankaŭ ni!" Malgraŭ ostomordanta frosta vento pli ol 40 virinoj ascendis la montpinton. Iuj el ili lernis marteladon, aliaj tenadon de ŝtala borstango kaj ili rapide ellernis en praktiko la teknikojn de farado de mintruo kaj dinamito kaj de mineksplodigo. Sur la tuta montpinto bruis mineksplodoj kaj disflugis tero kaj ŝtonoj. Post peniga laborado ili ne nur formovis tiun montpinton, sed ankaŭ kreis tie malgrandan ebenaĵon per alportita tero. Stimulate de tiu venko ili formovis aliajn tri malgrandajn montpintojn, kreis pli ol 7 hektarojn da kampoj kaj unuafoje ebligis al traktoro enveturi en Nannaŭ. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ la tuta Hijang bataladas por denove aranĝi tieajn montojn kaj riverojn.

## NOBLA STILO

"Ami ne nur sian propran kolektivon, sed ankaŭ alies kolektivojn." Tio estas komunisma stilo porpledata de Daĝaj en la pasintaj jaroj. Kaj nun tio jam fariĝis principo de agado de kamparanoj de Hijang. Ili rigardas subtenon al frataj komunumoj kaj brigadoj kiel sian nerifuzendan devon.

Foje Ljugiagoŭ-brigado de la najbara gubernio pretis konstrui akvokonservejon. Tamen iuj kadroj de la brigado ne havis memfidon pri tio pro la malgrandeco de sia forto. La partia filio de la brigado sendis kadron al Hijang-gubernio por konsulti Vang Dian-gjun, sekretarion de la partia filio de Bajjang-ju, avangarda unuo de lerno de Daĝaj en agrikulturo. Pensante pri la helpo de Ĉen Jongguj al Bajjang-ju, Vang Diangjun konsciis, ke helpi Ljugiagoŭ en konstruado de la akvokonservejo estas lia devo. Li do persone iris al tiu brigado por propagandi la spiriton de Daĝaj, kuraĝigis ilin per atingoj de iuj brigadoj de Hijang en lerno de Daĝaj kaj helpis tieajn kadrojn unuigi sian opinion kaj altigi sian memfidon.

Kiam Ljugiagoŭ-brigado renkontis malfacilojn en la konstruado, li kun komunumanoj de Bajjang-ju sub sia gvido iris tien helpi. Ekzemple ili transportis por Ljugiagoŭ sablon de malproksime kaj helpis ĝin per dinamito, meĉoj kaj cemento. Post pena laborado de kvin monatoj la akvokonservejo estis antaŭdate finkonstruita, dank' al kio Ljugiagoŭ finis sian historion de akvomanko. Krome ili kreis 20 hektarojn da kampoj, parto de kiuj estas irigaciata. En la sekvanta jaro la brigado akiris rikolton senprecedence bonan en la historio kaj per tio viciĝis inter la avangardaj unuoj de la tuta gubernio en la movado de lerno de Daĝaj en agrikulturo.

En Hijang preskaŭ ĉiu el la relative grandaj konstruaĵoj estas rezulto de kunlaboro de komunumoj kaj brigadoj post venko de multaj neimageblaj malfaciloj.

La komunisma stilo de la kamparanoj en Hijang montriĝis ankaŭ en tio, ke ili strikte ligas sian laboron kun firmigo de la diktaturo de la proletaro, subteno al la tutlanda konstruado kaj la monda revolucio kaj ĉiamaniere klopodas por fari pli multajn kontribuojn al la patrolando kaj la homaro. De 1967 ili ĉiujare superplenumis ŝtatan taskon de grenvendado, inkluzive de 1972, kiam ili trafis grandegan sekecon kaj ilia produktokvanto de greno reduktiĝis. Tiam en 1972 laŭ la stato de la katastrofo la ŝtato pretis redukti ilian grenvendan kvanton kaj ankaŭ disponigis milionojn da kilogramoj da greno al komunumoj kaj brigadoj plej serioze plagitaj. Sed la Hijang-anoj ne nur ne prenis de la ŝtato unu kilogramon da greno, sed eĉ superplenumis la grenvendan taskon post racia aranĝo de la vivo. La nobla revolucia spirito kaj komunisma stilo de la popolo de Hijang estas vaste laŭdata kaj donanta ĉiam pli grandan influon al la kamparo de nia lando.

# Hijang-gubernio antaŭenmarŝas per grandaj paŝoj




Kamarado Ĉen Jongguj inter komunumanoj







En la vespera
politika kurso




Membroj de la partia filio de Daĝaj-brigado persistas en studo de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj verkoj de Prezidanto Maŭ.

Edukado al la juna generacio pri klasbatalo kaj revolucia tradicio





Nova vidaĵo sub Hutoŭ-monto







Komunumanoj en transplantado de rizplantidoj






Alia akvokonservejo en konstruado

Eksplodigo laŭ difinita direkto




Riĉa rikolto jam videbla





Korpoekzameno al geknaboj

Daĝaj en nokto



# Pompe brilas ĉie ruĝaj Daĝaj-floroj

(Popolkanto de Hijang)

*Unu mano taŭgas por terkorbon porti,*
*kaj du manoj por transloki ŝtonojn.*
*Per dek manoj oni povas movi ŝipon,*
*per cent manoj alkonduki klaran fonton,*
*per mil manoj fekundigi sterilejon,*
*per dek mil manoj eĉ transloki monton.*
*Kiam okcent milionoj movas siajn manojn,*
*maroj kaj montegoj ekobeas homan volon.*
*La direkton montras Prezidanto Maŭ mansvinge,*
*kaj brilegas pompe ĉie ruĝaj Daĝaj-floroj.*

# Ĉambro de l' sekretario

de **ŜI TAJĴUJ** (Mjaŭo)

*Skribotablo,*
*tabullito,*
*pajl-ĉapelo, hojo,*
*unu vekto kaj du korboj:*
*jen la ĉambro de l' sekretario.*

*Lia ĉambro estas*
*vasta kaj tre hela:*
*kun fenestroj malfermitaj al l' aŭroro,*
*povas ĝi enteni mil kaj mil vilaĝojn.*
*Por desegni novajn planojn, tie ĉi okazis*
*multaj interkonsiliĝoj kaj kunsidoj;*
*sub lamplumo en profunda nokto*
*li studadas diligente ĝis la mateniĝo.*
*Li ligiĝas kun l' amasoj kor' al koro,*
*kaj rigardas vid-al-vide iliaj fenestroj.*

*Ardas la movado "lern' de Daĝaj en agrikulturo",*
*varme bolas la vilaĝoj kaj kamparo.*
*Estas nun ŝlosita l' ĉambro de l' sekretario,*
*kiu iris laborresti en vilaĝo monta.*
*Sur la manoj dikas multaj kaloj,*
*kaj odoras per terajo lia korpo.*
*En la hejmo de malriĉa kamparano*
*trovas lokon lia laborĉambro.*
*En la budo konstrueja,*
*la sekretario metas sian liton...*

*La sekretario havas ĉambron*
*vastan kaj tre helan.*
*En ĝi oni povas vidi malproksimen*
*kaj observi ĉion en apudo.*
*La fenestro kaptas en rigardo tutan komunumon,*
*Kaj la pord' akceptas la pejzaĝon de la mjaŭ-aj montoj.*

# *Kanto pri rokhakado*

de ŜEN ĴENKANG

*En la monta valo*
*ĉie sonas rokhakado,*
*martelsonoj venas de l' ĉielo,*
*inter nuboj flagras sparkoj.*
*Ĉiu monto servas kiel la tambur' milita,*
*kaj la plej altajn sonojn donas ŝtalaj stangoj.*

*Minaj truoj enbatiĝas sur centfuta roko,*
*ronde ŝvebas agloj sub piedoj de ministoj.*
*Larĝa vojo estas elhakita tra krutaĵo,*
*el la valo venas vento por sekigi ŝviton.*
*Daĝaj-flago brilas en la koroj,*
*ne timindas la krutaĵo nek abismo.*


*La kabano pajltegmenta estas ora domo nia,*
*malgraŭ malfaciloj dolĉ' sentiĝas en la koroj.*
*Lit' smeralda el bambuoj novhakitaj;*
*energi' abundas dank' al bona pens' en gvido.*
*Mineksplodoj alfluigas kanalakvon,*
*kun Tian-anmen ja ligiĝas la kanalokapo.*

*Rokministoj staras alte sur montpinto,*
*kvazaŭ nova monto sur montkresto.*
*Ili eksonigas kanton karesante rokon,*
*tuj obee eĥas la montegoj kaj la valoj.*
*Sur la ora voj' Daĝaj-a kun vipsvingo*
*kuras la rajdantoj al etapo nova.*

# La Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo

ANTAŬENPUŜATE de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la ĉinaj fervojistoj kaj popolanoj de la provincoj Henan kaj Hubej, kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, prenante la klasbatalon kiel ĉefĉeneron, kaj konstruis rapidege novan, gravan trafikan ĉeflinion — la Giaŭzuo-Ĝiĉeng-an Fervojon, post malfacila luktado en unuanima kunlaborado.


*La situo de la fervojo*




I

La nomita fervojo interliganta la karban urbon Giaŭzuo de Henan en la nordo kaj Ĝiĉeng de Hubej sur la suda bordo de Jangzi-rivero en la sudo longas 753 kilometrojn. Tiu fervojo paralelas al la Pekin-Kantona Fervojo, la granda trafika aorto de la nordo al la sudo tra Ĉinio, interkruciĝas en Luojang de Henan kun la Lanĝoŭ-Lianjungang-a Fervojo, la granda trafika aorto de la oriento al la okcidento tra Ĉinio, kaj ankaŭ interligiĝas kun ĝi per siaj pluraj branĉaj linioj. La fervojo ebligas transportadon de industriaj ekipaĵoj el norda Ĉinio kaj grandkvante produktata karbo el sudorienta Ŝanhi kaj nordokcidenta Henan al la baseno de Jangzi-rivero, kaj elportadon de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj el Gianghan-ebenaĵo kaj Nanjang-baseno kaj de fosfora minaĵo el montregiono de okcidenta Hubej al nordokcidenta, norda kaj nordorienta Ĉinio. Ĝi havas gravan signifon por faciligi la materian interŝanĝadon inter urboj kaj kamparo, akceli la industrian produktadon kaj montregionan konstruadon de centra-suda Ĉinio kaj plifortigi la kontraŭmilitan preparadon.

La normala funkciado de la fervojo en la lastaj jaroj pruvis ke ĝi estas bonkvalita. Plenŝarĝitaj vagonaroj galopas sur ĝi tagnokte trans riveroj kaj tra montoj. Dank' al la funkciado de la fervojo, la industria kaj agrikultura produk-



*Laboristoj streĉe konstruas Bajhe-ponton.*

tempa pluvo. En la lastaj kvin jaroj, la totala industria produkta valoro de la subprovinco triobliĝis kaj la longeco de ŝosea trafikado duobliĝis. La urbo Jiĉang estas delonge grava koncentrejo kaj transportejo de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj en okcidenta Hubej. Sed antaŭe la transportado estis plenumata nur per la akva vojo de Jangzi-rivero, kaj la jara en- kaj el-portkvanto de la urbo estis nur pli ol ducent mil tunoj. Post la ekfunkcio de la fervojo la transporta kvanto per ambaŭ akva kaj tera vojoj superis 1,300,000 tunojn.


## II

La vasta regiono trairata de la fervojo estas geologie komplika, kio alportis malfacilojn al ĝia konstruado. Ĝi trairas montozan parton de Henan kie estas altaj montoj kaj profundaj valoj, kaj multaj tuneloj devis esti konstruitaj, el kiuj iuj preskaŭ interligiĝas unu kun alia; dum en Hubej multas riveroj kaj lagoj kaj multaj pontoj kaj kulvertoj necesis. Por la tuta linio sume 2,389 pontoj kaj kulvertoj devis esti konstruitaj kaj grandega kvanto da teraĵo devis

*Fervojo-konstruantoj el diversaj lokoj lernas unu de alia en solidareco.*



tado kaj trafikado de okcidentaj Henan kaj Hubej multe disvolviĝis. En Nanjang-subprovinco de Henan pli ol cent novaj fabrikoj kaj minejoj estis konstruitaj en tiuj jaroj, rapide disvolviĝas precipe la industrioj rilataj al agrikultura produktado. La dizeloj por agrikulturaj uzoj, kemisterkoj, irigaciaj kaj drenaj ekipaĵoj multiĝis respektive du- ĝis kvar-oble ol tiuj antaŭ la ekfunkcio de la ferv jo kaj irigaciataj kampoj multiĝis preskaŭ per ducent mil hektaroj. Antaŭe mankis al Jiĉang-subprovinco de Hubej, kie estas multaj montetoj, hejtajoj kaj trafikaj faciloj. Dank' al la funkciado de la fervojo, grave ŝanĝiĝis ĝiaj kondiĉoj en trafiko kaj provizado de krudaj materialoj kaj hejtajoj tiel ke prospere disvolviĝas nun la lokaj industrioj kvazaŭ bambuidoj post prin-



*Hangiang-ponto de Hiangfan — granda ŝosea kaj fervoja ponto sur la Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo*

esti movata. Sed la ĉinaj fervojistoj kaj popolanoj-vojkonstruantoj harditaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio prenis la klasbatalon kiel ĉefĉeneron, profunde kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman linion de Liu Ŝaŭki, serioze plenumis la proletan revolucian linion de Prezidanto Maŭ kaj sukcesis konstrui tiun fervojon en ok monatoj de novembro, 1969 ĝis la unua de julio, 1970.

La rapida finkonstruo de la Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo efektiviĝis dank' al la popola forto; ĝi estis frukto de kombino de profesiuloj kun popolamasoj.

En novembro de 1969 la fervojistoj de diversaj lokoj kaj popolanoj-vojkonstruantoj el Henan kaj Hubej kolektiĝis en konstruejoj por komenci la grandan kampanjon. En frosta vintro hurlis norda vento kaj flirtis neĝflokoj en montregionoj de okcidentaj Henan kaj Hubej. Sed sur la konstruejoj de la fervojo regis varma printempa atmosfero. La amasa movado rapidigis la konstruadon de la tuta fervojo. En la fino de januaro 1970, formiĝis la fervoja bazo; kaj en la fino de aprilo, plenumiĝis la konstruado de ĉefaj partoj de la grandaj fervojaj pontoj.

Giuliŝan-tunelo longa je 2,130 metroj estas la gorĝo tra kiu vagonaro kuras al Nanjang-baseno kaj Gianghan-ebenaĵo. Je la komenco oni konstruis ĝin nur per malmultaj teknikaj fortoj, kaj post laborado de kelkaj monatoj formiĝis nur du kavoj ambaŭflanke de la monto Giuliŝan, tre malrapide progresis la konstruado. Post studado de instruoj de Prezidanto Maŭ pri amasa linio, la gvidantoj de la ĝenerala komandejo de la kampanjo ekkonis ke por konstrui la fervojon rapide, bone kaj ekonomie oni devas movi la amasojn sed ne nur malmultajn homojn. Ili do decidis fari en Giuliŝan popolan militon, vaste mobilizante amasojn por trovi pli da proponojn kaj metodojn. La laboristoj kaj popolanoj-vojkonstruantoj konsilis fosi multajn transversajn tunelojn kaj oblikvajn ŝaktojn al la fosota tunelo, dank' al kio tuj malfermiĝis pli ol 50 laborspacoj kaj multaj povis labori samtempe en kaj ekster la tunelo. Post nur iom pli ol tri monatoj la tuta tunelo jam estis komplete konstruita.

Al la fervojaj laboristoj kaj oficistoj kaj popolkomunumanoj el norda Henan estis aldonita la tasko konstrui fervojan pontegon super la furioza Flava Rivero. Iuj asertis tiam, ke tio devos esti rigardata kiel alta rapideco, se ili povos konstrui ĝin en tri jaroj, kiel saltego se en du jaroj. La fervojistoj kaj popolanoj-vojkonstruantoj timis nenian malfacilon kaj decidis venki la naturan obstaklon por elhaki novan vojon por konstrui rapidege kaj bonkvalite la pontegon super la Flava Rivero. Por konstrui la pontegon longan je 941.8 metroj oni bezonis almunti ŝtaltrabojn kun totala pezo de 3,400 tunoj, kiujn oni devis kunfiksi per 190,000 boltegoj kun alta forteco. Iu virina milicia plotono el Liuĝuang de Gijuan-gubernio, Henan meminiciate prenis sur sin la taskon plenumotan alte en aero. Sub la direktado de veteranaj laboristoj, tiuj vilaĝaj knabinoj venintaj de Tajhang-montaro grimpis alten je 40 metroj super la rivero, kaj plenumis la taskon en 40 tagnoktoj. Nur post sep monatoj kaj dek tagoj, la grandioza ŝtala pontego jam etendiĝis ĉielarke super la torenta Flava Rivero.

### III

Firme sekvi la principon de sendependeco, memstareco kaj sinapogo sur propraj fortoj kaj la principon de paŝado per du kruroj — komenci per indiĝenaj metodoj kaj kombini la indiĝenajn metodojn kun la modernaj — estas unu el la gravaj faktoroj por rapidega konstruo de la Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo. Subtaksante la indiĝenajn metodojn iuj demandis dubeme, ĉu per tiuj oni povas konstrui modernan fervojon. La fervojaj konstruantoj disvolvis batalon kontraŭ la eraraj pensoj superstiĉe adori fremdlandajn rimedojn, senfare atendi la necesajn kondiĉojn ktp. kaj per tio ili pluapaŝe likvidis la venenan influon de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj pretigis nombron da teknike komplikaj konstruaĵoj per indiĝenaj metodoj en kombino kun la modernaj.

Ekzemple, la ponto super Hanŝuj en Hiangfan de Hubej estas ponto duuza por fervojo kaj ŝoseo. Laŭ origina projekto por konstrui la bazojn de la dudek pilieroj de la fervoja alkonduka ponto, oni uzus maŝinon por fosi kaj enstarigi palisarojn kaj tio bezonus sep monatojn. Sed tiam ne estis sufiĉe da maŝinoj pro la samtempa laborado tra la tuta fervoja linio. Kion fari? Ĉu oni atendu maŝinojn aŭ komencu la laboron per indiĝenaj metodoj por kapti ĉiun minuton? La vasta amaso de laboristoj kaj popolanoj-vojkonstruantoj tiam plene elvolvis la latentajn fortojn de la disponataj maŝinoj kaj samtempe faris fosadon per homaj fortoj. Kaj rezulte ili nur uzis sepdek tagnoktojn por finkonstrui la dudek pilierojn ambaŭflanke de Hanŝuj-rivero, gajnante per tio valoran tempon por rapidege finkonstrui la ponton.

Nun, la vasta amaso de fervojaj laboristoj kaj oficistoj klopodas por plialtigi la transportan kapablon por ke la Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo ludu pli grandan rolon en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.

*La unua trajno sur la Giaŭzuo-Ĝiĉeng-a Fervojo*



JANG PO:



# Revolucia moderna pekina opero "Panŝivan"

La dekmil-lia Granda Muro majeste staras kiel fortika barikado. Ĝi estas fiero por la ĉina nacio. Tamen eĉ pli fierinda estas la ankoraŭ pli grandioza muro, kiu staras granite firma sur la ĉina tero, nome la miriada popolo, kiu sin armas kiel soldatoj.

La batala slogano "la tuta popolo estu armita kiel soldatoj kaj ĉiam preta por alfronti militon", kiun alprenis por defendi sian patrolandon kaj la venkajn fruktojn de la revolucio la ĉina popolo kiu multe suferis de subpremado kaj ekspluatado de reakcia regado kaj invadado de eksterlandaj malamikoj en la pasinteco. Kaj tio estas ankaŭ la temo de la revolucia moderna pekina opero *Panŝivan* nun prezentata en diversaj lokoj de nia lando.

En sonado de bukceno tuj kolektiĝas ĉe golfo viglecplena trupo el fiŝistoj, ŝipriparistoj, portistoj, instruistoj, kuracistoj, kuiristoj kaj eĉ nedeŝminkitaj amatoraj aktoroj, junaj kaj maljunaj de ambaŭ seksoj kaj eĉ junaj pioniroj kun ruĝa koltuko, en siaj manoj iuj havas fusilojn, aliaj fiŝforkegojn aŭ remilojn.

Urĝe kolektiĝas la milicianoj de la fiŝhaveno por alfronti animskuan batalon.

La pekina opero *Panŝivan* prikantas la penson pri popola milito elmetitan de Prezidanto Maŭ.

Kun klara epoka koloro ĝi prezentas per streĉa intrigo la batalan vivon de la ĉinaj mardefendaj armeanoj kaj lokaj loĝantoj en kuna ekstermado de armitaj malamikaj spionoj, modlante speciale la heroan figuron de Lu Ĉanghaj, baza milicia komandanto. La opero kaj la kolora filmo pri ĝi estas varme akceptataj de la spektantoj.

La opero rakontas pri okazaĵo en unu el la finaj tagoj de septembro, 1963. Ĉe la sunbrila golfo Panŝivan, la fiŝistoj post riĉa rikolto estas farantaj preparon por celebri la Nacian Feston. La sonoj de tamtamado kaj tamburado de la amatora teatra trupo ŝvebas super la tuta golfo.

Eĉ en suna tago povas okazi atako de neatendita frosto. Subite sur la maro vidiĝas suspektinda "fiŝkapta ŝipo", kiu zigzagas sur la maro sen ĵetado de reto, ŝtele pririgardante nian maran fronton. Nia heroo Lu Ĉanghaj, sekretario de la partia filio de Panŝivan-brigado kaj estro de la milicia kompanio, ekblovas la bukcenon por kolekti la milicianojn por almeti netrapenetreblan reton kontraŭ la malamikoj kunagante kun ĈPLA-trupo.

De unu ponardingo disvolviĝas la komplika intrigo de la opero.

Maljuna fiŝisto Hiang Vubo hazarde aŭdas malpezan frapon al arbotrunko, tamen kiam li aliras, la frapinto jam estas for. Li rimarkas ke la kalko kiu kovras la kavon de la arbo estas trarompita. Li trovas en la kavo pakaĵon, en kiu estas ponardingo volvita en blanka silktuko, sur kiu estas brodita sepio. Sepio estas kromnomo de loka pirato. Maljunaj fiŝistoj rekonas ke neniu sur la insulo povus posedi tiel lukse ornamitan ponardingon, se ne la fiŝista tirano Nigrakapa Ŝarko jam fuĝinta al Tajvan-insulo okaze de la Liberiĝo de nia patrolando. Kun alta revolucia singardemo Lu Ĉanghaj juĝas el la versaĵo gravurita sur la ponardingo, ke Sepio ankoraŭ sin kaŝas en Panŝivan, kaj Nigrakapa Ŝarko volas reveni en koluzio kun li, kaj ke la ponardingo servos kiel atesto por interligiĝo. Sed kiu estas Sepio? Kaj kiu kaŝis la ponardingon?

Nokte, furiozas la maro kaj hurlas vento. La fiŝista tirano Nigrakapa Ŝarko, nun la komandanto de la "Antaŭiranta Ekspedicio de Kontraŭkomunistaj kaj Nacisavaj Trupoj" de la Ĉiangkajŝek-a kliko enŝteliĝas ŝipe en internan maron kaj ordonas la banditon 08 surbordiĝi alivestita kun la ponardo kiel atesto por interligiĝi kun la sinkaŝinta ŝpiono Sepio esperante surprizi la insulon profitante la okazon de la celebrado de la Nacia Festo en Paŝivan. Post sia surbordiĝo, 08 rekte rapidas al la domo de "ŝipriparisto" Kiu Erneng. Pro manko de vigla singardemo la estro de la fiŝkapta grupo Hajgen konfidencis al Kiu Erneng, la multjare sinkaŝinta Sepio, pri la trovo de ponardingo. Vidinte la danĝeran situacion Kiu Erneng forfuĝas tuj en la nokto pro timo de malkaŝiĝo. Tiel en lia domo la atente observanta Lu Ĉanghaj akceptas la "gaston" je malfrua nokta horo. En reciproka prisondado, ŝajnigante sin "amiko de la dommastro", Lu Ĉanghaj kuraĝe kaj sagace akiras fidon de la malamiko post la provo de la ponardingo, kiu precize adekvatas al prezentita ponardo. Finfine 08 kredas ke ili ambaŭ estas "kamaradoj", kaj informas Lu Ĉanghaj pri la tuta plano de la banditoj pri ŝtela surbordiĝo, kaj Lu arestas 08.

Survoje Kiu Erneng renkontas Nigrakapan Ŝarkon. Vidante ke la intrigo estas malkaŝita, la banditoj estas devigitaj serĉi alian vojon por ŝtela surbordiĝo. En hasteco, la kaŭĉuka boato dronas tuŝante rifon kaj la banditoj surgrimpas la najbaran insulon Janvej.

Sur Janvej-insulo kun verda monto sub blua firmamento punktita de blankaj nuboj loĝas la patrino de Kiaŭlian. Kiaŭlian, la edzino de Lu Ĉanghaj, kaj ŝia patrino tiam ornamas la dompordon per ruĝaj flagoj kaj koloraj lanternoj por celebri la feston. Kiaŭlian antaŭe estis milicianino aktiva sur ekzercejo, tamen post sia edziniĝo ŝi pli kaj pli kroĉiĝis al la vivo de sia malgranda familio. Pro malakriĝo de sia singardemo, ŝi facile kredas la mensogon de la malamikoj, kiam la lastaj venas alivestite al ŝi por pruntepreni boaton. Sed ŝia patrino estas veterana fiŝistino kun alta revolucia singardemo. Ŝi foje kaj refoje pridemandas la malamikojn. Per tio ŝi evidentigas ilian dubindecon kaj kla-

rigas al Kiaŭlian la okulojn. En urĝeco ŝi sagace sugestas al juna pioniro Atuan ke li tuj ascendu la monton por alarmi al la milicianoj per faligo de la "signal-arbo". Kiam la malkovrita Nigrakapa Ŝarko elmontras sian ferocan vizaĝon, la patrino kaj la filino per fiŝforkego kaj hakilo brave ekluktas kontraŭ la malamikoj. La milicianoj sub la gvido de Lu Ĉanghaj ĝustatempe alvenas tien kaj la banditoj estas venkitaj.

Survoje post faligo de la signal-arbo Atuan renkontas la forfuĝantajn banditojn kaj estas kaptita kaj kunportita de ili en kavernon de klifo.

En la profunda kaverno kun kuriozaj ŝtonoj regas mallumo, kie estas facile por defendi kaj malfacile por ataki. Lu Ĉanghaj kondukas milicianojn tien kaj post eksterordinara danĝera batalado kvazaŭ en kaŝludo elsavas Atuan. Sed la bandita ĉefo Nigrakapa Ŝarko kaj la vickomandanto Ding Venĝaj saltas en la maron kaj forfuĝas. Kun ruĝa koro fidela al la popolo kaj la socialisma patrolando, spite al tranĉa vundo sur sia brako Lu Ĉanghaj rezolute persekutas la malamikojn sola en la maro.

Ambaŭ malamikaj ĉefoj surgrimpas sur Langja-rifon proksiman al la ekstera maro, kaj ankaŭ Lu Ĉanghaj tuj poste. Sur la rifo, li sentime kaj aplombe batalas kontraŭ la du malamikoj. Unuflanke utiligante la kontraŭdiron inter ili li devigas la ŝanceliĝan malamikan vickomandanton formeti sian armilon kaj allogi al Langja-rifo la alian grupon da malamikoj origine atendantaj ordonon sur la ekstera maro por kunagado; kaj aliflanke li volvas la navigan signallampon per sanga tuko por signale alvoki la soldatojn de ĈPLA kaj milicianojn serĉantajn la malamikojn. Kaj fine la banditoj estas komplete ekstermitaj kaj la Nigrakapa Ŝarko estas kaptita.

"Ĉiu domo estas gardejo, kaj ĉiu homo soldato". Tiuj vortoj el la kanto de la opero koncentre montras, ke la miriada armeo kaj popolo de Ĉinio estas vigle singardemaj kaj ĉiam pretaj por ekstermi ĉiujn malamikojn, kiuj aŭdacas invadi. Ĉiu ajn malamiko, kiu provos lanĉi agresan militon, certe dronos en la maro de popola milito same kiel la banditoj en la opero.

---

HIN VEN:

# Ĝojindaj atingoj de la ĉina film-industrio

LA nove fondita film-industrio de Ĉinio rapide disvolviĝis en la lastaj jaroj kaj atingis ĝojindajn sukcesojn. Nun, en multaj provincoj kaj urboj film-industrio jam estas fondita. La tutlanda produktokvanto de kinaj virgaj filmoj en 1975 6-obliĝis kompare kun tiu de 1965. La nigraj-blankaj filmoj preskaŭ de ĉiaj specoj produktitaj de ni jam povas fundamente plenumi la enlandajn bezonojn. Granda kvanto da koloraj filmoj, kies produktado estis monopolita de imperiismaj landoj, jam estis produktita de ni, kaj ili konsistigis 54% de la totala produktokvanto de filmoj de la tuta lando. Ankaŭ ekipaĵojn kaj materialojn por fabrikado de filmoj Ĉinio jam povas produkti en kompletoj.

Nun, pro la rapida disvolviĝo de la film-industrio, la virgaj filmoj, fabrikitaj de Ĉinio ne nur povas plenumi plejparton de la enlandaj bezonoj sed ankaŭ povas esti iom eksportitaj. Multaj koloraj filmoj kiel ekzemple tiuj pri la revoluciaj modernaj pekinaj operoj *Sagaca Kapto de la Tigra Monto, La Ruĝa Signal-lanterno* kaj *Rododendra Monto,* la revolucia moderna baleto *Himno al Jimeng,* la koloraj rakontaj filmoj *La Pina Monto, La Dua Printempo, Trembrilanta Ruĝa Stelo* kaj *Rompiĝo kun la Malnova Tradicio,* la koloraj sciencaj filmoj *Drogherboj, Akupunktura Anestezo* kaj *Aerflua Ŝpinado,* la koloraj dokumentaj filmoj *La Parko de la Okcidenta Antaŭurbo* kaj *Pando,* la koloraj filmoj pri teatraĵoj *Novaj Kantoj kaj Dancoj* kaj *Maljunuloj kun Ruĝa Koro* ĉiuj ili estas faritaj per virgaj filmoj produktitaj de nia lando. Tiuj filmoj karakteriziĝas per freŝaj koloroj, riĉaj nuancoj kaj versimilaj figuroj. La ĉefaj normoj de iuj filmoj jam atingis aŭ preskaŭ atingis la avangardan nivelon de la mondo, kaj ili rikoltis multajn laŭdojn de la spektantoj.


Tiuj atingoj de la ĉina film-industrio estas la venko de la batalado de la ĉina laborista klaso kontraŭ "kompradora filozofio" kaj "rampismo" per la revolucia spirito de sendependeco kaj memdecido kaj sinapogo sur propraj fortoj.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Partio kaj la ŝtato tre atentas la disvolviĝon de la film-industrio. En la jaroj 1958 kaj 1959, sub la instigado de la antaŭen-saltego de la naciekonomia konstruado, la laboristoj de Ŝanhajo, Baŭding, Tiangin ktp. sukcesis provprodukti la unuajn kolorajn kaj blankajn-nigrajn filmojn kaj per tio finis la historian periodon, en kiu Ĉinio ne povis fabriki filmojn. Sed tre malrapide disvolviĝis la film-industrio pro malhelpo de la malnova Ministerio de Kulturaj Aferoj, kiu superstiĉe adoris fremdlandojn. Antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio, nur tri fabrikoj en la tuta lando povis produkti iujn nigrajn-blankajn filmojn. La pli ol 90% de la virgaj filmoj bezonataj de la enlandaj filmaj studioj estis importitaj, kaj post la fotado la koloraj filmoj devis esti senditaj al fremdlandoj por rivelado. Sub tia stato, la social-imperiismo ĉiamaniere klopodis por malhelpi nin, kun la vana espero sufoki nian kinematografian aferon.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vastaj laborantoj firme plenumis la principon de sendependeco kaj memdecido, sinapogo sur propraj fortoj kaj kritikis la "rampismon" kaj "kompradoran filozofion" de Liu Ŝaŭki kaj Lin Biaŭ, kio forte puŝis la disvolviĝon de la film-industrio. Precipe, kun la disvolviĝo de la literatura kaj arta revolucio markita de la revoluciaj modelaj teatraĵoj, granda kvanto da filmoj estas bezonataj por surekranigi heroajn figurojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Tio plientuziasmigis la kadrojn kaj la amasojn, kaj mobilizis la socialisman aktivecon de ĉiuj flankoj, kaj aperis viglecplena situacio de la filmoproduktado.

En la disvolviĝo de la film-industrio, ĉieaj partiaj komitatoj kaj koncernaj departementoj fortigis sian gvidon al tiu laboro. Ili praktikis la principon de irado per ambaŭ piedoj — samtempe disvolvi grandajn, mezajn kaj malgrandajn entreprenojn, samtempe uzi indiĝenajn kaj modernajn metodojn kaj samtempe disvolvi la ŝtatajn kaj la lokajn entreprenojn. Ili organizis entreprenojn por socialisma kunlaboro. Kaj per kombino de laborantoj, kadroj kaj teknikistoj kaj kombino de unuoj de scienca esplorado, produktado kaj uzado, ili grandskale disvolvis amasan movadon, kaj venkis multajn teknikajn malfacilojn per pena batalado.

Nun la laborantoj de la film-industrio estas antaŭen marŝanta en venko kun la heroa spirito ke **"nenio en la mondo malfacilas, se oni nur kuraĝas alten grimpi",** por akiri ankoraŭ pli grandajn sukcesojn en nemalproksima estonteco.



KUANG BO kaj LIAN ŜI:

# Pri nova terapio de ostorompiĝo

LASTATEMPE ni vizitis la Tiangin-an Hospitalon. Sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ ĝi kreis novan terapion de ostorompiĝo aplikantan la okcidentan kaj ĉinan medicinojn en kombino. Multaj pacientoj estas resanigitaj pli rapide ol antaŭe, dank' al apliko de tiu terapio.

Ni venis al la ostologia kliniko de tiu hospitalo. Tie iu juna kirurgo estis ekzamenanta pacientinon. Laŭ la ĵus farita X-radia foto li konstatis, ke al la pacientino rompiĝis la radiuso kaj ulno de la dekstra antaŭbrako. La kirurgo kondukis la pacientinon en la operaciejon kaj kuŝigis ŝin. Post kiam flegistino injektis narkotaĵon en ŝian dekstran brakon, la kirurgo faris al ŝi, kune kun du helpantoj, palpadon, tiradon, puŝadon kaj premadon al la vundita parto, rigardante la X-radian foton. Baldaŭ la rompitaj ostoj estis rekunigitaj. La helpantoj alprenis kvar saliklignajn latojn kaj kelkajn paperajn subtenaĵojn kaj helpis la kirurgon rapide fiksi por la pacientino la rompitajn ostojn. X-radia ekzameno pruvis ke la ostoj estas ĝuste rekunigitaj. Post tio la kirurgo diris detale al la pacientino atentindaĵon kaj la daton de reekzameno.

Post foriro de la pacientino ni faris interparolon kun la kirurgo. Li diris, ke li studis la okcidentan medicinon en instituto. Antaŭe por kuraci tian ostorompiĝon oni ordinare devis fari operacion por reĝustigi la rompitan oston, fiksi ĝin per ŝtalaj latoj kaj ŝraŭboj kaj poste bandaĝi la vunditan parton per gipso. Tio ne nur multe dolorigis la pacientojn, iafoje eĉ kaŭzis komplikaĵojn aŭ postsekvaĵojn, sed ankaŭ multe kostis.

En 1958, sub la kuraĝigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"La ĉina medicino estas granda trezorejo kaj oni devas klopodi por ĝin elfosi kaj altigi"**, leviĝis arda tajdo de lerno de la ĉina medicino. Ŝang Tian-ju kaj aliaj kuracistoj de la ostologia fako de la nomita hospitalo vizitis veteranajn ĉinmedicinajn kuracistojn por lerni de ili. Ili miris, ke la lastaj reĝustigas rompitan oston per masaĝo kaj bandaĝas per bambua kurteno. Ilin pli mirigis tio, ke iuj el la pacientoj, kiuj ne resaniĝis en ilia hospitalo, ricevis rimarkindan kuracan efikon ĉe ĉinmedicinaj kuracistoj. Ili propraokule vidis la avantaĝojn de la ĉina medicino kaj decidis ĝin lerni. La partia komitato de la hospitalo subtenis ilin kaj invitis ĉinmedicinajn kuracistojn labori kune kun ili. Post esplorado de dekkelkaj jaroj precipe post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio ili kreis relative kompletan novan terapion de ostorompiĝo, dank' al resumo de sia sperto.

Ni petis la kirurgon klarigi al ni pri la karakterizaĵoj de tiu nova terapio. Li diris: "Laŭ la terapio oni diagnozas per X-radia ekzameno kaj reĝustigas rompitan oston per maniero de la ĉina medicino. Ĝi evitigas ne nur malĝustan rekunigon de rompitaj ostoj, sed ankaŭ doloron pro operacio. Ĝia alia karakterizaĵo estas, ke oni fiksas rompitan oston per lignolatoj anstataŭ gipsobandaĝo ebligante liberan moviĝon de la supra kaj malsupra artikoj, kio povas ne nur faciligi la movojn de la paciento kaj cirkuladon

de sango, sed ankaŭ akceli rekuniĝon de rompita osto. Krome fiksado per lignolatoj povas esti laŭbezone reguligita kaj havas bonan efikon. Krom la supre diritaj avantaĝoj la nova terapio malofte kaŭzas ankilozon, atrofion de muskolo kaj malkompaktiĝon de osteino.

Kiam ni demandis, ĉu oni alprenis tiun novan terapion al ĉiuj pacientoj de ostorompiĝo aŭ ne, alia kuracisto respondis: "Nun en nia hospitalo 90% de la kazoj de ostorompiĝo ĉu simpla aŭ komplika, ĉu freŝa aŭ malnova, ĉu ferma aŭ malferma, ricevis kuracadon per la nomita terapio kaj 96% de la kazoj sukcesis. Rilate al freŝaj kaj malfermaj ostorompiĝoj kaj iuj artikaj ostorompiĝoj, oni ankoraŭ unue faras operacion al la pacientoj kaj fiksas la rompitan oston per gipsobandaĝo. Kiam la kuracado atingis certan efikon oni aplikas la novan terapion."

Je tio, la kuracistoj invitis nin pririgardi malsanulan ĉambron.


Ĝi estas vasta kaj hela, ekipita per diversaj instrumentoj por korpoekzercado, kaj aspektas kvazaŭ ekzerca ĉambro de akrobata trupo. Tie gaje babilis la pacientoj, iuj el ili sin ekzercis per puŝado de ĉareto, aliaj piediradis helpe de lambastonoj kaj triaj faris funkcian ekzercadon kuŝante sur litoj . . . Montrante iun junulon puŝantan ĉareton la kuracisto diris al ni:

"Li estas laboristo de aŭta fabriko. Antaŭ du monatoj li rompis al si la maldekstran femuralon kaj jam estis trafita de ŝoko kiam li enhospitaliĝis. Post urĝa traktado oni kuracis lin per la nova terapio kaj helpis lin fari funkcian ekzercadon. En la sepa semajno li jam povis piediri, nun li ofte helpas flegistinojn en ordinara laboro kaj baldaŭ li povos elhospitaliĝi."

Kial funkcia ekzercado ludas tiel aktivan rolon en kuracado de ostorompiĝo? La kuracisto diris: "La funkcia ekzercado povas akceli la sangan cirkuladon kaj metabolon de osteino de la pacientoj, movi ĉiujn aktivajn faktorojn de la korpo kaj krei kondiĉojn por ostorekuniĝo. Iuj el la rompitaj ostopecoj povas mem rekuniĝi en la movado." Li daŭrigis: "Dum lernado kaj uzado de la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ en praktiko ni konis, ke movo kaj fikso estas kontraŭoj en unueco. Por rekunigi rompitan oston oni devas ĝin fiksi kaj ĉiuj movoj malutilaj al tio devas esti limigitaj. Sed tio ne signifas absolutan fiksiĝon. Ĉiuj movoj utilaj al rekuniĝo de la rompita osto, ekzemple tiuj de supra kaj malsupra artikoj de la rompita osto kaj aliaj partoj de la korpo devas esti aktive kaj pli kaj pli multe farataj, tio konformas al la movada leĝo de kontraŭdiroj de la homa korpo. Ĉar nia nova terapio konformas al tiu objektiva leĝo, ĝi havas bonan efikon. Ĝi povas mallongigi la tempon de rekuniĝo je triono kaj la tutan kuracan tempon je duono".

Parolante pri la funkcio de rekunigita osto la kuracisto, kiu zorgas pri la malsanula ĉambro, elmontris kelkajn pacientajn dosierojn kaj X-radiajn fotojn kaj diris al ni: "Tiu aktoro rompis al si la maleolojn de la dekstra piedo kaj suferis samtempe de ektopio, tamen li povis denove daŭrigi sian prezentadon post resaniĝo. Tiu sportisto denove aktivadas sur sportejo post rekuniĝo de la rompitaj ulno kaj radiuso de la dekstra antaŭbrako." Montrante la trian malsanulan dosieron li diris: "Tiu 28-jara hongkonga maristo oblikve rompis al si la maldekstran femuralon. Antaŭ ol li venis al nia hospitalo li jam ricevis kvar operaciojn dum kuracado de du jaroj kaj duono kaj pro tio lia femuralo mallongiĝis je kvar centimetroj. Pro nerekuniĝo de la rompita osto formiĝis pseŭda artiko kaj la antaŭe movebla patelo kripliĝis. Post trimonata kuracado per la nova terapio la rompita osto fundamente rekuniĝis kaj la artika funkcio plejparte restariĝis."

Nur malmultaj kazoj estas menciitaj ĉi tie. En la pasintaj dekkelkaj jaroj multaj resanigitaj pacientoj ĝoje revenintaj al siaj laborpostenoj skribis al la hospitalo por esprimi sian koran dankon. Tamen tiuj popolaj medicinaj laborantoj neniam fieras pro tio, ili ĉiam rigardas tiujn leterojn kiel fortojn puŝantajn ilin daŭre antaŭenmarŝi. Ĝuste kiel tiuj kuracistoj diris adiaŭante nin: "Forigi suferojn por la popolo estas devo kaj ankaŭ plej granda ĝojo de ĉiu revolucia kuracisto. En la estonteco ni daŭre klopodos por firmigi kaj altigi tiun novan terapion kaj pli bone servi al la popolo."




# Eterne daŭros la torentoj de Jangzi kaj Sejno

GU HAJ

LAŬ invito de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la franca registaro, la Ĉina Ĵurnalista Delegacio faris amikan viziton al Francio je la fino de 1975, transveturinte vastajn oceanojn.

Dum sia duonmonata restado en Francio, la delegacio vizitis la urbojn Parizon, Turon, Lionon kaj Nantes, la pitoreskan basenon de Luaro kaj la regionon Bretagne apud Atlantiko. Ĉie, kien ĝi alvenis, ĝi estis varme kaj amike akceptata de la francaj registaro kaj popolo.

Post starigo de la diplomatiaj rilatoj, senĉese disvolviĝas la rilatoj inter Ĉinio kaj Francio. En la sekvanta tago post la alveno de la delegacio al Parizo, ĝin akceptis respektive Ĉefministro Jacques Chirac, Edgar Faure, prezidanto de la Franca Nacia Asembleo kaj Michel d'Ornano, ministro de la Industria kaj Esplora Ministerio de Francio.

En Francio ĉie oni povas senti la ĝeneralan postulon pri plifortigo de la amikeco inter Ĉinio kaj Francio, ĉar tio konformas tiel al la interesoj de la popoloj de ambaŭ landoj kiel al la nuna tendenco de la historia disvolviĝo.

Kiam la delegacio vojaĝis en Francio, ĝi ricevis varman akcepton de provincestroj, urbestroj kaj membroj de asembleo. La provincestro de Finistere amike gastigis la delegacion en sia hejmo. Dum la festeno, li foje kaj refoje tostis por pli granda disvolviĝo de la rilatoj inter Francio kaj Ĉinio. Kaj la mastrino demandis kun granda intereso pri la kulturaj aferoj, edukado, kuraca sistemo kaj la nudpiedaj kuracistoj de Ĉinio. Ŝi esprimis deziron iam viziti Ĉinion, por kontakti ĉinajn popolanojn kaj koni Ĉinion.

Kiam la ĉina delegacio vizitis Parizan Muzeon, ĝi renkontis grupon da viglaj naivaj infanoj de elementa lernejo. La infanoj kaptis la ĉinajn gastojn je la manoj kaj petis iliajn aŭtografojn. Je la disiĝo, ili diris en la ĉina lingvo "ĝis revido" kaj "dankon". Tio sentigis al la membroj de la delegacio, kiom amikan senton la francaj amasoj havas por la ĉina popolo.

Plue disvolvi la amikan rilaton inter Ĉinio kaj Francio estas komuna deziro de la franca kaj ĉina popoloj. Kaj en Champagne, la delegacio iris kun tiaj nobla deziro kaj emocio al la tombo de Generalo Charles de Gaulle, la neflekseb1a batalanto en rezisto kontraŭ faŝisma agreso kaj defendo de la sendependeco de la franca nacio, kaj metis al ĝi kun respekto florkronon. La ĉinaj gastoj interparolis kun la maljuna gardisto de la tombejo. Kiam ili parolis pri tio, ke la amikeco inter Ĉinio kaj Francio estas disvolvita sub la prizorgo de Prezidanto Maŭ Zedong kaj Generalo de Gaulle, la maljunulo diris: "Tia amika rilato disvolviĝos plue. La ĉina popolo estas granda popolo."

La profunda amikeco inter la ĉina kaj franca popoloj havas longan historion. En antikveco, la du popoloj jam komencis amikan interkontakton. Ĉinaj silko, silkaĵoj kaj porcelanaĵoj estis transportataj tra la Silka Vojo aŭ per oceanaj ŝipoj al Francio, ili plaĉis al la franca popolo kaj estis rigardataj kiel multvaloraĵoj. Hodiaŭ, kiam en la malstabila mondo la du superpotencoj pli kaj pli arde luktas por superregi Eŭropon, Ĉinio kaj Francio havas multajn komunajn kaj similajn vidpunktojn koncerne al internaciaj problemoj. Ĝuste kiel Ĉefministro J. Chirac diris dum akcepto de la delegacio, kvankam Francio kaj Ĉinio havas malsamajn politikajn kaj sociajn sistemojn, tamen ili samopinias pri multaj problemoj, precipe pri la defendo de nacia sendependeco kaj malaprobo al hegemonio de superpotencoj. Ĝuste sur tiu fundamento, la amikaj rilatoj inter la du landoj disvolviĝadas.

Dum siaj vizitoj en Francio, la delegacio vidis multajn objektojn atestantajn la kontraŭagresan spiriton de la franca popolo. En Bretagne de okcidenta Francio multaj urbetoj starigis en si monumenton por memorigi la martirojn en rezistado kontraŭ faŝismo. Iu franca amiko diris, ke la popolo de tiu regiono tre brave batalis kontraŭ la faŝismaj agresantoj kaj preskaŭ ĉiu familio havis membron aŭ parencon, kiu heroe oferis sian vivon en la batalo. La antikva urbo Liono en centra Francio estis la centro de rezistado kontraŭ faŝismaj agresantoj. Tiam la kontraŭfaŝismaj batalantoj batis la agresantojn utiligante la apartan karakteron de la urbo, kie estas multaj tuneloj kaj koridoroj, kiuj interligas la kortojn kaj ĉambrojn de unu

domo al alia. La ĉinaj gastoj rigardis tunelon, ĝin trairante laŭ la piedsignoj de kontraŭfaŝismaj batalantoj. La tieaj tuneloj kvazaŭ diris, ke se iutage la hodiaŭaj hitleroj aŭdacos ataki Bretagne kaj Lionon, la tiea popolo kun glora kontraŭfaŝisma tradicio certe ne indulgos ilin!

La delegacio vizitis kelkajn lokojn de historia signifo. En la tombejo de Pastro Lachaise, la ĉinaj gastoj rigardis kun respekto la Muron de Komunumanoj kaj metis antaŭ ĝi florkronon. Tie heroe martiriĝis siatempe eminentaj gefiloj de la franca revolucia popolo. La delegacio ankaŭ vizitis Bastil-placon, kie eksplodis la Granda Franca Revolucio de 1789, kiu skuis la tutan Eŭropon. Hodiaŭ jam malaperis Bastilo, kiu siatempe simbolis la feŭdan monarkismon kaj estis okupita de la heroa pariza popolo. Sur la placo staras alta ŝtala kolono kun statuo de la Diino de Libero kun etenditaj flugiloj je la supro, kiu memorigas pri la venko de la franca burĝa revolucio. Antaŭ tiuj historiaj atestaĵoj oni profunde sentas, ke la franca popolo estas granda popolo kun glora revolucia tradicio kaj historia iniciatemo.

Kvankam la Ĉina Ĵurnalista Delegacio faris nur mallongtempan viziton en Francio, tamen ĝi estis profunde impresita de la amikeco, kiun la gastama franca popolo montris al la ĉina popolo. Kiam la delegacio estis forlasonta Parizon por reveni al sia patrolando, iu franca amiko kiu venis por adiaŭi ĝin, diris kun profunda signifo: "Monto ne povas renkonti monton, sed la homoj povas iam revidi unu alian. Mi esperas, ke ni ĝoje intervidiĝos ree iam en la estonteco." Jes, la amikaj kontaktoj de la ĉina kaj franca popoloj senĉese daŭros kiel la torentoj de la riveroj Jangzi kaj Sejno.




# La nusu-oj

de ZONG MIN

NUSU-NACIECO kun pli ol 13,000 membroj estas antikva nacieco loĝanta ambaŭborde de la riveroj Nugiang kaj Lancang de la ĉina Junnan-provinco.

Tiu regiono estas riĉa je montoj kaj riveroj. La riveroj Lancang, Nugiang kaj Drung trafluas ĝin de la nordo al la sudo, la altaj montaroj Biluo kaj Gaŭligong leviĝas inter la riveroj kaj formis tri kanjonojn. Sur la montoj kreskas densaj praarbaroj, en kiuj vivas tigroj, leopardoj, ursoj, agloj kaj aliaj raraj bestoj kaj birdoj. Jam de fora antikveco la nusuoj kaj alinaciecaj popolanoj diligente ekspluatas tiun fekundan landliman regionon de la patrolando per siaj kuraĝo kaj saĝo.

La nusuoj okupiĝas ĉefe pri agrikulturo. La grenplantoj kulturataj de ili estas maizo, fagopiro, hordeo, nuda hordeo kaj aliaj. En la pasinta longa periodo, pro la kruela regado kaj subpremado de la reakciaj regantaj klasoj, la socio kaj ekonomio de nusu-nacieco disvolviĝis tre malrapide, la produkta nivelo estis malalta. La nusuoj havis tre malmultajn ferajn instrumentojn kaj ĉefe uzis bambuajn kaj lignajn ilojn. Ilia agrikultura produktado estis tre primitiva, la rikoltita greno ne sufiĉis por la vivtenado kaj pro tio ili devis ĉasi bestojn kaj kolekti sovaĝajn fruktojn. Preskaŭ ĉiu juna viro de nusu-nacieco portis kun si memfaritajn arbaleston kaj venenajn sagojn, kiuj estis iliaj ĉefaj armiloj en ĉasado.

Antaŭ la Liberiĝo, nusu-nacieco ne havis evidentan socian labordividon, la metio kaj komerco ankoraŭ ne estis apartigitaj el agrikulturo, kaj oni interŝanĝis objektojn kontraŭ objektoj. En ĝia socio ekzistis terposedaj sistemoj de primitiva komunumo kaj individua familio. La edziĝinta viro vivis aparte de siaj gepatroj. La nusuoj loĝis en ortangulaj domoj lignaj aŭ bambuaj, ĝenerale kun du ĉambroj, el kiuj la ekstera estas uzata por akcepti gastojn kaj la interna kiel dormoĉambro.



*Junulino de nusu-nacieco*

En la historio la nusuoj kaj najbaraj naciecoj plurfoje faris revoluciajn batalojn kontraŭ la subpremado kaj ekspluatado fare de la reakcia reganta klaso kaj imperiisma agreso. En 1935 la nusuoj, lisuoj kaj alinaciecaj popolanoj de Fugong-gubernio de la baseno de Nugiang-rivero kune faris arman insurekcion, mortigis oficistojn senditajn de Kuomintango, forbruligis arkivojn kaj kontolibrojn kaj oku-

pis la oficejon. En 1937 la nusuoj kaj lisuoj faris rezolutan batalon kontraŭ imperiistoj invadintaj en Fugong por spionado. Tiuj bataloj donis solidan baton al la reakciaj regantoj kaj invadintaj imperiistoj.

Printempe de 1950 la tuta baseno de Nugiang-rivero estis liberigita kaj de tiam komenciĝis nova paĝo de la historio de nusu-nacieco.

Post la Liberiĝo, sub la gvido de la Partio ĉiuj gubernioj de tiu regiono rapide starigis popolan reĝimon. En aŭgusto de 1954 stariĝis la Nugiang-a Lisu-nacieca Aŭtonoma Subprovinco kaj en la unua de oktobro, 1956, la Gongŝan-a Drung- kaj Nusu-nacieca Aŭtonoma Gubernio. Dank' al tio la nusuoj pliapaŝe efektivigis siajn rajtojn de mastro de la ŝtato.

En la efektivigo de la nacieca regiona aŭtonomeco la nusuoj paŝon post paŝo suriris la oran socialisman vojon. Post la Liberiĝo pro malsameco de ekonomia disvolviĝo kaj historiaj kondiĉoj iuj lokoj efektivigis agraran reformon kaj aliaj lokoj suriris de primitiva komunumo rekte sur la vojon de interhelpado kaj kooperado. Ili ĉiuj efektivigis agrikulturan kooperadon paŝon post paŝo kaj starigis popolajn komunumojn en 1969, kiam la Granda Proleta Kultura Revolucio gajnis grandan venkon.

Post la Liberiĝo la agrikultura produktado de tiu regiono progresis jaron post jaro, precipe post efektivigo de popola komunumigo disvolviĝis la arda amasa movado de lerno de Daĝaj kaj aperis bona situacio en produktado. Ekzemple, Dimaluo-brigado de Gongŝan-gubernio rikoltis 340 tunojn da greno en 1971, t.e. duoble tiom kiom en 1965. En 1972 ĝia totala produktokvanto de tritiko pliiĝis je 30% kompare kun tiu de 1971. Krom tio la brigado starigis 9 paŝtejojn, kulturejon de drogherboj kaj fruktoĝardenon.

En la malnova socio nenia industrio troviĝis en tiu regiono. Nun jam stariĝis industriaj entreprenoj de pli ol dek specoj kiaj etaj agrikulturiloj, brikoj kaj tegoloj, rizsenŝeligo, elektro, fajencaĵoj, led-, suker-, ole-preparado, aŭtoriparado kaj senĉese grandiĝis la laboristaro de nusu-nacieco. Ĉar en tiu regiono multas riveroj kaj montoj, ĝi estis rigardata en la pasinteco kiel loko "kie kaproj ne povas trovi por si vojon kaj eĉ simioj malĝojas pro malfacila irebleco". Nun ŝoseoj kun pontoj nove konstruitaj sur la riveroj Nugiang, Lancang kaj Drung kondukas al ĉiu gubernio kaj strikte ligas tiun regionon kun la internaj partoj de la patrolando.

En la pasinteco la nusuoj notis aferojn per ŝnur-nodoj kaj atestis ion per ligno-gravurado. Post la Liberiĝo, la gubernioj de tiu regiono starigis mezlernejojn kaj la brigadoj ĝenerale fondis elementajn lernejojn. Sane kreskas la unua generacio de nusuaj gejunuloj kaj geknaboj kun socialisma konscio kaj klereco. Antaŭ la Liberiĝo la nusuoj vivis mizere kaj havis nenian rimedon de kuracado. Epidemioj cirkulis kaj multaj homoj mortis pro malsanoj. Nun la gubernioj kaj komunumoj starigis hospitalojn, kuracejojn kaj la produktaj brigadoj ĉiuj havas siajn nudpiedajn kuracistojn. La nombro de profesiaj kuracistoj multe pligrandiĝis. Bridiĝis epidemioj kaj multe pliboniĝis la sanstato de la popolanoj.

Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la nusuoj atingis multajn sukcesojn kaj progreson. Nusu-nacieco saltis trans plurajn stadiojn de socia evoluo rekte en la socialisman socion.





En la sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj troviĝas la granda ebura skulptaĵo "Ĉengdu-Kunming-a Fervojo". Ĝi estas unu el la du metiartaĵoj senditaj de la ĉina registaro al U.N. kiel donaco. La alia estas murtapiŝo "La Granda Muro", pri kiu nia revuo jam raportis en la 2-a numero de 1976.

La Ĉengdu-Kunming-a Fervojo estas ĉefa fervoja linio en sudokcidenta Ĉinio interliganta la ĉefurbon de la provinco Siĉuan Ĉengdu kaj tiun de la provinco Junnan Kunming kun totala longo de 1,085 km. Ĝi trairas grandajn montojn kaj transpasas multajn riverojn. Post kiam ĝi malfermiĝis al trafiko en la 1-a de julio 1970, ĝi multe faciligis interligon de la trafike neoportuna sudokcidenta limregiono de Ĉinio kun la aliaj lokoj de la lando.

La skulptaĵo prenis tipan parton de la fervojo kiel objekton de kreado. Ĝia unua plano estas la nove konstruita ŝtala ponto super Dadu-rivero kaj ĝia ĉirkaŭaĵo kun la ferĉena ponto, kiun trapasis en 1934 la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo en sia Longa Marŝo, kiel fono. Estas enkomponitaj en la sama skulptaĵo fabrikoj, minejoj, ŝtupaj kampoj kaj akvoutiligaj konstruaĵoj kaj celebraj scenoj de diversnaciecaj popolanoj pri la inaŭguro de la fervojo, tiel ke

# Unu granda ebura skulptaĵo


de **LI ĈANGJAN**



montriĝas bildo: blankaj nuboj ŝvebas ĉirkaŭ altaj montoj viciĝantaj unuj post aliaj kun densaj arbaroj supre kaj ondanta fluo sube; ŝtala ponto ĉielarke pendas inter du montoj; fervojo kiel flirtanta rubando serpentumas ĉirkaŭ montoj; trajno kuregas sur la ŝtala ponto kaj ties fajfado kvazaŭ estus aŭdebla. La celebrantaj amasoj svarme sonigas tamburojn kaj gongojn kaj knabinoj en festaj kostumoj gaje dancas svingante silkajn rubandojn. Eĉ cervidoj en densa arbaro estas surprizitaj: iuj staras en embaraso kaj aliaj forkuras de timo, kiam trajno unuafoje venas al praarbaro en profunda montaro. La tuta kreaĵo reflektas la prosperan aspekton de la socialisma Ĉinio.

La skulptaĵo kun totala longeco de 150 cm. kaj alteco de 110 cm. estas produktita de la Pekina Metiarta Fabriko. La projektadon plenumis grupeto kun laboristoj kiel la ĉefa forto kaj kun partopreno de teknikistoj kaj gvidantoj de la fabriko. Antaŭ la projektado, ili iris al la lokoj laŭ la fervojo por sperti tie la vivon kaj kolekti materialojn por sia kreaĵo. Tio helpas por ke ilia kreaĵo havu profundan bazon en la vivo. La skulptadon faris spertaj veteranaj metiistoj kaj junaj laboristoj okupintaj sin pri la metio ankoraŭ ne longe. Dum skulptado ili solidare interhelpis reciproke kaj ŝparis neniun klopodon por atingi kiel eble plej bonan rezulton. Ili ne nur disvolvis la karakterizaĵon de delikateco kaj subtileco, kiujn propre posedas tiu artgenro, sed ankaŭ klopodis doni la aktualan revolucian etoson en formado de homfiguroj kaj pejzaĝo kaj en komponado de la tuta sceno. Per artisma rimedo de variigo de detaleco kaj denseco ili lerte aranĝis la rilatojn inter la ĉefa kaj dependaj objektoj, inter proksima kaj fora distancoj kaj inter rekta kaj malrekta esprimoj por reliefigi kaj la imponecon de la granda ŝtala ponto,

*Laborantoj de la Pekina Metiarta Fabriko interkonsiliĝas pri la kreado de la ebura skulptaĵo "La Ĉengdu-Kunming-a Fervojo".*



**KOREKTOJ**

N-ro 2
P. 41, maldekstra kolono, L.17: "1946" legu "1936".

N-ro 4
P. 49, meza kolono, L. 5: "1947" legu "1949".

kaj trajnon serpentume kuranta tra altaj montoj kaj profundaj valoj kaj la majestecon kaj belecon de la pejzaĝo. Kaj la homfiguroj estas aparte natursimilaj kaj vivecaj.

La eburskulpta arto de Ĉinio komenciĝis en Jin-dinastio antaŭ 3,000 jaroj. Ĝiaj ĉefaj produktejoj estas Pekino, Kantono kaj Ŝanhajo, ĉiu kun siaj apartaj karakterizaĵoj. Tamen en la malnova Ĉinio pro la ekspluato de la reakciaj regantaj klasoj kaj invado kaj prirabado de imperiismo, tiu metiarto disvolviĝis tre malrapide kaj iuj teknikoj de tiu arto preskaŭ perdiĝis en la antaŭvespero de la Liberiĝo. Iuj el la maljunaj metiartistoj devis vivteni sin per almozpetado.

Post la Liberiĝo la socialisma sistemo malfermis vastajn perspektivojn por la disvolviĝo de la eburskulpta metiarto. La metiartistoj emancipiĝis politike kaj fariĝis sekuraj en vivtenado.

Ili unue estis organizitaj en metiartajn kooperativojn, kaj poste laboras en fabrikoj ŝtate funkciigataj. Sub la direktado de la principoj formulitaj de Prezidanto Maŭ **"Kune floru cent floroj"** kaj **"forigu la malnovajn kaj elŝovu la novajn"**, la eburskulpta metiarto reviviĝis kaj rapide disvolviĝas. Ĝi ankoraŭ pli prosperas post la Granda Proleta Kultura Revolucio. La artistoj iras profunde en la ardan batalvivon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, akumulis multe da materialo kaj kreis grandajn kvantojn da metiartaĵoj por prikanti heroajn personecojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj priskribi la majestajn pejzaĝojn de la patrolando. Tiuj verkoj enkorpigis altgrade la spiriton de la epoko kun klara nacia stilo kaj loka koloro kaj trovas la ŝaton de la vastaj popolamasoj. La ebura skulptaĵo "Ĉengdu-Kunminga Fervojo" estas unu el la multaj elstaraj kreaĵoj inter ili.

HISTORIAJ RAKONTOJ

# Socia reformo de Ŝang Jang

de TAN FEN

ANTAŬ pli ol 2,300 jaroj Ĉinio sin trovis en la periodo de granda socia ŝanĝiĝo, en kiu la leviĝanta feŭda sistemo anstataŭis la putran sklavan sistemon. Tiam la unuigita Ĝoŭ-dinastio de la sklava sistemo ekzistis nur nominale, sed pereis fakte. Multaj dukaj regnoj, inter kiuj la ĉefaj estis Ki, Ĉu, Jan, Ĝaŭ, Han, Vej kaj Kin, interbatalis en sinsekvaj jaroj. Oni nomas tiun periodon en la ĉina historio periodo de Militantaj Regnoj.

Tiam la batalado de la vastaj amasoj de sklavoj kaj plebanoj kontraŭ aristokratoj-sklavmastroj arde leviĝis senĉese kaj ŝancelis la fundamenton de la sklava sistemo. Profitante de la revolucia situacio de la insurekcioj de la sklavoj kaj plebanoj la nove leviĝanta bienularo en iuj regnoj disvolvis batalon por kapti regpotencon de sklavmastroj. La duka regno Vej (nordorienta parto de la nuna Henan-provinco kaj suda parto de Ŝanhi-provinco) aplikis la socian reformon de legalizisto Li Kuj, batis la restaŭrajn fortojn de sklavmastroj, firmigis feŭdan regadon kaj disvolvis feŭdan ekonomion, kaj fariĝis la plej potenca regno en tiu tempo. Tamen Kin, regno najbara al Vej, estis relative postiĝinta. Tie aristokratoj-sklavmastroj havis grandajn fortojn kaj rajtis abdikigi kaj surtronigi regnestron kaj tial ofte okazis internaj bataloj. Regnestro de Kin Hiaŭgong urĝe deziris potencigi sian regnon pere de reformado. Nelonge post sia surtroniĝo li ordonis varbi saĝulojn en la regno.

Informiĝinte pri tio eminentulo el la legalizistoj Ŝang Jang (390-338 a.K.) tre ĝojis. En sia juneco li jam sisteme studis *Klasikaĵon pri Leĝoj* kompilitan de Li Kuj kaj havis idealon potencigi sian landon per regado laŭ leĝo.

Li multfoje konsilis al Hiaŭgong praktiki socian reformon kaj aboli la elmodiĝintan sklavan sistemon en ekonomio kaj politiko. Lia propono estis forte oponata de la aristokratoj-sklavmastroj kaj pro tio leviĝis akra debato en la kortego de Kin.

La reprezentantoj de la aristokratoj-sklavmastroj persiste proponis imiti antikvajn etiketojn kaj praktiki konfucianisman linion. Per la historiaj faktoj Ŝang Jang kritikis tiun pedantan kaj arkaikan starpunkton. Li diris, ke oni devas fari socian reformon laŭ la evoluo de la historio, sed ne kroĉi al la malnova sistemo.

Ŝang Jang refutis la konfucianisman linion en la debato kaj Hiaŭgong decidis fari socian reformon. Poste, pro granda sukceso de Ŝang Jang en la reformo Hiaŭgong konfidis al li oficojn egalajn al ĉefministro kaj granda generalo. La ĉefa enhavo de la reformo de Ŝang Jang estis:

**Aboli sklavan agraran sistemon.** Laŭ tiu sistemo sklavmastroj devigis sklavojn labori senpage por ili sur difinitaj terpecoj. La nova leĝo nuligis tiun privilegion de la sklavmastroj, sankciis privatan terposedantecon kaj kuraĝigis la popola-

nojn kulturi virgan teron, kio liberigis produktajn fortojn kaj akcelis disvolviĝon de la feŭda ekonomio.

**Premii agrikulturadon kaj tekstiladon.** Tiuj, kiuj multe produktis grenon kaj teksaĵojn, estis senigitaj je servuto kaj imposto. Spekulaj komercistoj kaj nenifarantoj kune kun siaj familianoj estis konfiskitaj de la registaro kaj devis labori kiel servistoj.

**Aboli sistemon pri "heredeco de supera ofictitolo kaj privilegio"** kaj **premii militajn meritojn.** Kiuj el la malnovaj aristokrataj familioj ne faris meritojn en milito, tiuj estis senigitaj je titolo de aristokrato. Plebanoj, kiuj faris meritojn en milito, povis esti premiitaj. Samtempe en la tuta regno efektiviĝis sistemo de gubernioj, kio eksproprietigis la aristokratojn-sklavmastrojn je regado kaj komando super la armeoj sur la komuna feŭdo kaj plifortigis la feŭdan centralizismon. Krome li unuecigis la mezursistemon.

La reformo proponita de Ŝang Jang estis profunda socia ŝanĝo kaj neeviteble trafis en fortan oponon de la aristokratoj-sklavmastroj. La reprezentanto de konfucianoj Meng Ke, kiu persistis sur starpunkto de restaŭro, malice kalumniis Ŝang Jang. Iuj el la grandaj aristokratoj-sklavmastroj intence subinstigis la kronprincon malobservi la leĝon, provante malhelpi efektivigon de la nova leĝo. Fronte al la provoko de la restaŭraj fortoj Ŝang Jang montris nenian ŝanceliĝon. Laŭ la difino "puni sen distingo de rangoj", li severe punis tiujn aristokratojn-sklavmastrojn, kiuj malhelpis aŭ subfosis praktikon de la nova leĝo, ekzilis la obstinegajn aristokratojn malproksimen por ke ili ekspluatu tie virgan teron, mortigis nombron da aristokratoj-sklavmastroj oponantaj la novan leĝon kaj forbruligis klasikajn verkojn de konfucianoj *Ŝiging* kaj *Ŝuging* propagandantajn restaŭron.

Laŭ registro, dek jarojn post praktiko de la nova leĝo tute ŝanĝiĝis la politika fizionomio de Kinregno: Disvolviĝis la produktado, multiĝis la enspezo pro impostoj de la feŭda registaro, abunda estis la fonto de rekrutoj kaj bravaj estis la soldatoj en milito, tiel ke Kinregno rapide fariĝis unu el la tiamaj potencoj. Tio metis politikan kaj ekonomian bazon por Imperiestro la Unua de Kin-dinastio poste en unuigo de Ĉinio.

Sed la socia reformo de Ŝang Jang esence estis reformo de bienula klaso, kaj estis limigita de historio kaj klasa naturo. Kiam Hiaŭgong, kiu subtenis la reformon, mortis, la aristokratoj-sklavmastroj tuj faris frenezan rebaton. En la jaro 338 a.K. kronprinco Si surtroniĝis kaj nomis sin Hujvang. Tiam la aristokratoj-sklavmastroj, kiuj malamegis Ŝang Jang, denuncis mensoge al la regnestro, ke li kovis ribelon. Hujvang ordonis aresti Ŝang Jang. La lasta tuj fuĝis el la ĉefurbo aliloken kaj organizis trupojn por batali kontraŭ la restaŭraj fortoj. Tamen li malvenkis pro malforteco de sia armeo. La reakciuloj mortigis lin per la plej kruela puno de korpodistiro per ĉaroj kaj ankaŭ lian tutan familion.

La tragedio de Ŝang Jang kaj lia familio ĝuste malkovris la trompecon kaj hipokritecon de konfucianoj pri regado laŭ etiketo. Kvankam Ŝang Jang mortis, tamen lia nova leĝo daŭris. Lia progresema afero pri anstataŭigo de la sklava sistemo per la feŭda sistemo estis nebarebla de la reakciuloj. Poste sur la bazo de la socia reformo de Ŝang Jang Imperiestro la Unua de Kin efektivigis la grandan aferon de unuigo de Ĉinio kaj fondis la aŭtokratan centralizisman feŭdan landon unuan en la ĉina historio.

## Kurantaj Aferoj

### LA SUNA URBO EN UTILIGO DE SUNA ENERGIO

Lasao, la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, konata kiel Suna Urbo komencis utiligi sunan energion en servo al la popola vivo.

En la urbo sunenergia banejo kun giganta vitra baseno por varmigado de akvo per sunbrilo povas servi somere al pli ol 300 personoj en ĉiu tago kaj al pli ol 100 en frosta vintro. Post sia finkonstruiĝo, tiu banejo povas ŝpari 2.5 tunojn da karbo en ĉiu tago.

La tutjara sunbrila tempo de Lasao longas je 3,000 horoj kaj la forteco de tiea sunradiado estas la plej granda en la tuta lando. En tiu urbo oni povas utiligi sunan energion en ĉiuj sezonoj. Nun krom sunenergia banejo, tie funkcias ankaŭ pli kaj pli multaj sunenergiaj kuiraj fornoj diversformaj, kiuj estas simplaj kaj uzeblaj por kuiri manĝaĵon kaj boligi akvon.

### FLOSA DOKO HUAŜAN SUKCESE LANĈITA

Alia 10,000-tonela flosa doko Huaŝan de nia lando estis lastatempe sukcese lanĉita en Nankino.

Flosa doko estas pli oportuna, pli rapide konstruebla per malpli multe da mono ol fiksa doko. La flosa doko Huaŝan longas je 164 metroj, larĝas je 37.2 metroj kaj altas je 14.6 metroj. Tiu doko povas levi 9,000 tunojn kaj en ĝi oni povas ripari 15,000-20,000-tonelan oceanan ŝipon. Ĝi estas ekipita per ĉiaj necesaj maŝinoj por riparado de

ŝipo kaj estas funkciigata je sufiĉe alta nivelo de elektriziteco kaj aŭtomateco. Por konstrui ĝin oni uzis nur iom pli ol ok monatojn, rimarkinde malpli multe da tempo ol antaŭe en konstruado de tia flosa doko.

## NOVE TROVITA FOSILIO DE STEGODONTO

Antaŭ nelonge oni trovis fosilion de stegodonto en kaverno de Guĵĝoŭ en suda Ĉinio. Ĝi estas relative kompleta fosilio de stegodonto unuafoje trovita en tiu regiono. Ĝia malkovro estas alia grava trovo post tiu de la antikva elefanto de la Flava Rivero en nia lando.

Stegodonto estis giganta mamulo vivanta en plioceno kaj plejstoceno kaj malaperinta jam antaŭ longe. En la pasinteco oni trovis en Guĵĝoŭ nur fosiliojn de kelkaj molaroj kaj membroostoj de tiu besto. Oni konstatis, ke la fosilio de relative kompleta skeleto kun kranio, incizivoj, molaroj, spino, skapoloj, ripoj k.a. apartenis al vira stegodonto. La trovo de tiu fosilio havas gravan signifon por la geologia esplorado kaj konado pri la geografia kaj klimata medio kaj biologia evoluo de sudokcidenta Ĉinio.

## AL KAMPARO, AL LIMREGIONOJ

Ĉijare la diplomitaj studentoj de Kinghua-universitato, la Pekina Universitato, la Pekina Industria Universitato, la Pekina Medicina Instituto, la Pekina Dua Medicina Instituto, la Pekina Kemiindustria Instituto kaj aliaj altaj lernejoj decidis iri la vojon montritan de Prezidanto Maŭ pri kombiniĝo kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, amase sin anoncis por iri al la kamparo kaj landlimaj regionoj por partopreni en tiea socialisma konstruado kaj esti pioniroj de limigo de burĝaj rajtoj kaj malgrandigo de diferencoj inter laboristoj kaj kamparanoj, inter urboj kaj vilaĝoj kaj inter fizika kaj cerba laboroj.

Inter ili 32 jam estis permesitaj iri al la kamparo por labori tie kiel kamparanoj kaj 434 al Tibeto, Hingiang kaj Kinghaj por partopreni en tiea konstruado. La Pekina Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Pekina Revolucia Komitato okazigis kunvenon por varme adiaŭi tiujn diplomitajn laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn, kiuj donis ekzemplon en rompo kun tradiciaj konceptoj.

## NOVAJ METIARTAĴOJ DE TIANGIN

La metiartistoj de Tiangin aktive produktas novajn verkojn spegulantajn la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de la ĉina laboranta popolo.

La produktovaloro de metiartaĵoj de la tuta urbo en 1975 estis kvaroblo de tiu antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la specoj plimultiĝis de 1,200 ĝis pli ol 2,900.

La metiartaĵoj de Tiangin kun longa historio estas delikataj kaj belaj kaj havas apartan nacian stilon. Sed antaŭ la Granda Proleta Kultura Revolucio la plejparto de la metiartaĵoj temis pri dandoj, belulinoj, imperiestroj, generaloj, budhoj, raraj bestoj kaj aliaj, kiuj servis kiel aprezaĵoj de la bienularo kaj burĝaro. En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio la vastaj amasoj de laboristoj kaj oficistoj de tiu metio disvolvis amasan kritikon al la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj levis movadon de kreado de verkoj kun novaj temoj, por ke novaj metiartaĵoj entuziasme prikantu socialismon, la Grandan Proletan Kulturan Revolucion kaj novajn socialismajn aferojn.

## LA TUTLANDA DANCA FESTIVALO EN PEKINO

En februaro de la kuranta jaro en Pekino okazis la Tutlanda

*"Feliĉa Lumo" prezentata de la reprezentanta dancotrupo de Siĉuan-provinco en la festivalo.*



Danca Festivalo, la unua post la Granda Proleta Kultura Revolucio, kiu inkluzivas dancojn de unuopo, duopo kaj triopo.

En la festivalo partoprenis 51 profesiaj kaj amatoraj trupoj de diversaj provincoj, municipoj, aŭtonomaj regionoj kaj ĈPLA kaj prezentis 262 malgrandajn dancojn kreitajn en la lastaj jaroj. Multaj dancoj varme prikantas la Grandan Proletan Kulturan Revolucion kaj la novajn socialismajn aferojn kaj spegulas avangardajn aferojn de la ĉina popolo en la revoluciaj movadoj de lernado de Daking en industrio kaj lernado de Daĝaj en agrikulturo, kaj en plifortigo de preparado kontraŭ milito kaj nacidefendo. La programeroj estis senprecedence riĉaj en enhavo, variaj en formo kaj vastaj en temo. La prospereco de la ĉina dancarto estas rezulto de serioza praktikado de la literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj lernado de sperto de la revoluciaj modelaj teatraĵoj.

## REVUO DE SKIADO

De la 18-a ĝis la 23-a de februaro okazis en Ŝangĝi-gubernio de Hejlonggiang-provinco skiada konkurso de la Tria Tutlanda Sporta Kunveno de la Ĉina Popola Respubliko.

En tiu konkurso partoprenis 12 skiaj teamoj de provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. La 312 geskiistoj, inter kiuj 80% estas geknaboj, apartenas al la hana, manĉura, mongola, huja, korea, kazaĥa, ujgura kaj dahura naciecoj. Ili partoprenis en konkurso de 27 disciplinoj inkluzive de skikurado kaj montskiado.

De post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio la skiado de nia lando ricevis novan disvolviĝon kaj aperis en ĝi granda nombro da nevaj sportistoj. Dank' al la hardado de la revolucia batalo multe ŝanĝiĝis la spirita fizionomio de la skiistoj kaj ĝenerale leviĝis ilia teknika nivelo. Ĉifoja konkurso estis la plej grandskala post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio. Dum la konkursado ĉiuj teamoj serioze praktikis la principon "amikeco la unua kaj konkurso la dua", lernis unu de alia kaj kune klopodis por levi la teknikon. La solidareco kaj amikeco montrita de la diversnaciecaj sportistoj en la konkursejo rikoltis varman aplaŭdon de la vastaj rigardantoj.

## NOVAJ ELDONAĴOJ DE ŜANHAJO

La Ŝanhaja Popola Eldonejo eldonis grandan nombron da libroj prikantantaj novajn socialismajn aferojn, kiuj trovis varman akcepton de la vastaj revoluciaj amasoj.

Dum planado de la eldonado la eldonejo prenis temojn spegulantajn la grandan kulturan revolucion kaj la novajn socialismajn aferojn kiel gravan parton de siaj eldonaĵoj. Ĝi eldonis librojn pri la revoluciaj modelaj teatraĵoj kaj studo de laboristoj pri filozofio kaj ankaŭ pli ol 470 diversajn verkojn inkluzive de disertaĵoj, specialaj broŝuroj, literaturaj, muzikaj kaj belartaj verkoj prikantantaj la triflankan kombiniĝon de maljunaj, mezaĝaj kaj junaj kadroj, sanan kreskon de la daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro, la kadran lernejon de "la sepa de majo", administradon de lernejoj fare de laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, vizitadon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj al universitatoj, kreskon de la teoria vicaro de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, iron de intelektaj junuloj al la kamparo kaj kreskon de nudpiedaj kuracistoj. En la lastaj jaroj oni eldonis ankaŭ nombron da romanoj, noveloj kaj poemoj kreitaj de intelektaj junuloj laborantaj en la kamparo kaj montregionoj. Tiuj literaturaj kaj artaj verkoj estas alte taksataj kaj laŭdataj de la vastaj amasoj de laboristaj, kamparanaj kaj soldataj legantoj.

## REPLANTADO DE LIBERA MUSKOLO SUKCESIS EN ĈINIO

Medicinaj laborantoj de la ostologia sekcio de la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo sukcesis en replantado de libera muskolo.

Estis paciento kiu rompis al si ulnon kaj radiuson. Pro netaŭga kuracado estiĝis nekrozo de la brakialo, rigidiĝis la artiko de lia maldekstra mano kaj liaj fingroj ne povis etendiĝi kaj fleksiĝi. La nomita hospitalo faris operacion al la paciento anstataŭigante lian mortintan muskolon per muskolo de alia parto de homa korpo. Dank' al zorgema kuracado bone cirkulas la sango en la mano kaj brako de la paciento kaj estas nenia ŝveliĝo kaj infektiĝo. La ekzameno de elektromiogramo pruvis, ke la replantita muskolo jam viviĝis kaj nervo jam komencis rekreski. Post duonjaro la fingroj de la maldekstra mano de la paciento jam povis mem etendiĝi kaj labori.

Replantado de muskolo estas tre delikata kirurgia operacio. Dum la tuta procedo de la operacio kuracistoj devis atentege kaj kun ekstrema respondecemo kunkudri sub mikroskopo la eksteran membranon de nervoj kaj la molajn kaj glitajn vejnojn kaj arteriojn per kudrilo kaj fadeno kun triona dikeco de kapharo.

# Song Giang

# –kapitulacisto en "Akvorando"



1. Dum la regado de imperiestro Ĝaŭ Gi en la lastaj jaroj de la Norda Song-dinastio (960 — 1127 p. K.), la klasaj kontraŭdiroj estis tre akraj. Laŭ lia instrukcio la oficistoj kruele prirabis kaj ekspluatis la vastajn amasojn de kamparanoj kaj kolektigis kuriozajn florojn kaj ŝtonojn en la malsupra baseno de Jangzi-rivero por ilin ŝipe transporti al la ĉefurbo por ornami la imperiestran ĝardenon. Ankaŭ la koruptitaj ŝtatoficistoj kaj tiranaj bienuloj pliintensigis sian ekspluatadon al la kamparanoj, tiel ke la lastaj dronis en profunda mizero. **La kruela ekonomia ekspluatado kaj politika subpremado de la bienularo al la kamparanoj devigis la lastajn multfoje fari insurekciojn kaj oponi kontraŭ la regado de la bienula klaso.**



2. La bravuloj Ĉaŭ Gaj, Vu Jong, la tri fratoj Ĵuan kaj aliaj en Ŝandong malamegis la imperiestron kaj koruptitajn ŝtatoficistojn pro ilia kruela ekspluato al la popolo. Ili informiĝis, ke iu ŝtatoficisto de Hebej rabakiris multe da trezoroj de la popolo kaj sendos ilin al la ĉefurbo kiel donacon al sia bopatro, altranga ŝtatoficisto, okaze de jubileo de lia naskiĝtago. Per ruza aranĝo Ĉaŭ Gaj, Vu Jong kaj aliaj senkonsciigis per narkoto la eskorton en pinarbaro kaj forportis kun si la valoraĵojn.




3. Baldaŭ la registaro malkovris spuron de la forprenintoj de la trezoroj kaj sendis kapti Ĉaŭ Gaj kaj la aliajn. Ĉaŭ Gaj firme decidis ribeli kaj kune kun Vu Jong kaj la fiŝistoj tri fratoj Ĵuan brave batalis kontraŭ la alsenditaj oficiroj kaj soldatoj kaj frakase ilin venkis. Poste Ĉaŭ Gaj rapidis kun siaj kamaradoj al Liangŝan-monto por kune entrepreni insurekcion.



4. La insurekcia armeo sur Liangŝan elektis Ĉaŭ Gaj kiel sian gvidanton. En intima kunlaboro kun Vu Jong, la tri fratoj Ĵuan kaj aliaj, li konstruigis ŝipojn, fabrikigis armilojn, trejnis soldatojn kaj akumulis grenon kaj furaĝon por disvolvi armitan batalon kontraŭ la imperiestro de Song-dinastio. Ili donis fortajn batojn al la registaraj trupoj, koruptitaj ŝtatoficistoj kaj tiranaj bienuloj. Baldaŭ famiĝis Liangŝan, kaj insurekciaj trupoj de diversaj lokoj iris por aliĝi al ĝi. Ĉar Ĉaŭ Gaj praktikis la principon enoficigi homojn ĉiun laŭ ties kompetenteco, rapide kreskis la fortoj de Liangŝan kaj prospere progresis la insurekcia afero.



5. Malalta oficisto en gubernia registaro nomata Song Giang, kiu estis filo de bienulo kaj de sia knabeco plenplene sorbis en sian menson reakciajn pensojn de Konfucio kaj Mencio, kaj kies sola vivcelo estis strebado al famo kaj altrango, forfuĝis pro la krimo de mortigo al sia konkubino. Sed li ne kuraĝis aliĝi al la insurekcia armeo timante ke li ne atingos sian ambicion laŭ tiu vojo. Kiam la registaro sendis aresti lin, li elektis la vojon de sinakuzo ĉe la aŭtoritatoj post interkonsiliĝo kun sia patro.



6. Song Giang lerta en intrigado ofte akiris konfidon de aliaj per malgrandaj helpoj al ili. Kiam registara trupo estis arestonta siatempe Ĉaŭ Gaj, Song Giang informis tion al li por akiri la renomon de justamo. Ĉaŭ Gaj kaj liaj kamaradoj pro tio prenis Song Giang kiel sian "savanton". Kiam Song Giang estis eskortata al ekzilejo preter Liangŝan, Ĉaŭ Gaj kaj aliaj rabis lin el la manoj de la eskortantoj kaj konsilis lin aliĝi al ilia grupo. Li eĉ surgenuiĝis antaŭ ili kaj plore diris: "Se vi ne lasos min descendi la monton, mi mem mortigos min ĉi tie." Ĉaŭ Gaj povis fari nenion alian ol lasi lin libera laŭ lia volo.




7. En la ekzilejo Song Giang konatiĝis kun Li Kuj, kiu devenis de malriĉa kamparano. Iutage, trinkante vinon en restoracio, Song Giang tre ĉagreniĝis pro sia sorto ke anstataŭ plenumiĝo de lia ambicio li falis en senesperan ekzilitecon. Estante en ebrieco li skribis du poemojn sur la muro de la restoracio por esprimi sian malkontenton. Pro liaj "ribelaj poemoj" la registaro kondamnis lin al morto. En la tago de ekzekutado, Ĉaŭ Gaj kaj Vu Jong alvenis kun insurekciaj trupoj en civilaj vestoj kaj forrabis Song Giang de la ekzekutejo. Havante neniun elirejon, li devis provizore aliĝi al la armeo de Liangŝan.




8. Sur Liangŝan Song Giang plene praktikis siajn duvizaĝulajn manovrojn. Publike li respektis Ĉaŭ Gaj, sed kaŝe li ĉiamaniere forpuŝis lin. Ĉiufoje kiam estis grava milita agado, Song Giang ĉiam proponis sian servon por ludi rolon en ĝi kaj konsilis Ĉaŭ Gaj resti sur la monto kun la celo altigi sian prestiĝon kaj uzurpi la komandan rajton de la armeo. Ĉaŭ Gaj iom rimarkis lian kaŝan intencon kaj foje insistis mem komandi la armeon al batalo.



9. En tiu batalo Ĉaŭ Gaj trafiĝis de venena sago kaj mortis. Song Giang, kiu delonge kolektis ĉirkaŭ si fortojn servantajn al lia intereso, uzurpis la gvidantecon de Liangŝan. Okupinte la gvidan postenon, li tuj ŝanĝis Gjuji-halon (halo de insurekcio) en Ĝongji-halon (halo de lojaleco), por montri sian lojalecon al la imperiestro de Song-dinastio, kaj tiel la linio de kamparana insurekcio de Ĉaŭ Gaj estis anstataŭita per kapitulaca linio bazita sur la doktrinoj de Konfucio kaj Mencio.



10. Por antaŭenpuŝi sian kapitulacan politikan linion Song Giang energie klopodis por akcepti kapitulacistojn kaj perfidulojn por formi sekton por lia egoisma celo. En Hebej estis reakcia granda bienulo nomata Lu Gjunji, kiu ĝisoste malamegis la revolucian popolon. Song Giang tamen faris ĉion por venigi lin sur Liangŝan kiel sian fidindan asistanton uzante grandan kvanton da homaj kaj materiaj fortoj.




11. Al oficiroj de la registaraj trupoj militkaptitaj Song Giang kutime "persone malligis ilin", "riverencis al ili" kaj poste persvadis ilin al kapitulaco. Timante punon pro la malvenko, la kaptitaj oficiroj devis konsenti aliĝon al la armeo de Liangŝan kaj atendi amnestion kaj varbon de la imperiestro en la estonto. Kaj Song Giang lokis ilin ĉiujn sur gravajn postenojn. Tiuj personoj venintaj de la supera tavolo de la reganta klaso ekkaptis gravajn funkciojn de la insurekcia armeo. Tio pretigis favorajn kondiĉojn al Song Giang por antaŭenpuŝi la kapitulacan linion.



12. Kiam kolektiĝis 108 ĉefoj sur Liangŝan, Song Giang opiniis, ke jam estas tempo por komplete kapti al si la potencon kaj plene ŝanĝi la linion. En iu nokto, li ruze aranĝis mistifikon kaj li elfosigis ŝtonplaton el la tero, sur kiu gravuriĝis la nomoj de la 108 ĉefoj de la monto kaj al ĉiu nomo estis aldonita nomo de stelo. La nomo de Song Giang troviĝis en la unua loko kaj tiu de Lu Gjunji en la dua. La nomoj de ĉiuj devenintoj de riĉaj familioj kaj eksoficiroj troviĝis en la antaŭaj lokoj, sed mankis tiu de Ĉaŭ Gaj, la fondinto de Liangŝan kiu persistis en la linio de kamparana insurekcio dum sia vivo. Tiamaniere la ruza kaj insidema ĉefo de kapitulacistoj Song Giang ŝanĝis la gvidantan kernon de la insurekcia armeo.



13. Post nelonge, Song Giang alvenigis ĉiujn ĉefojn de Liangŝan al festeno por amuziĝi kaj rigardi florojn. Iom ebriinte, Song Giang improvizis poemon en kiu estis jenaj versoj: "Rapide venu de l' imperiestro ordon' pri enakcepto amnestia — jen soldeziro mia." Tre kontenta pri sia poemo Song Giang ordonis kanti la versojn antaŭ la festenantoj.



14. Evidente tio estis publika pledado de Song Giang al kapitulaco. Apenaŭ finiĝis la kantado, iuj ĉefoj de la insurekcia armeo jam elpaŝis kun opono. Kun neretenebla kolero Li Kuj renversis festenan tablon kaj laŭte kriis: "Ĉiam amnestio kaj varbo! Kia utilo al ni tia aferaĉo!"




15. Tio forte ofendis Song Giang. Li tuj deŝiris sian maskon de ĉiama inklino al "frateco" kaj elmontris sian ferocan vizaĝon kaj ordonis, ke oni dehaku la kapon de Li Kuj. Ĉar ĉiuj oponis kontraŭ lia decido, li konsentis lin pardoni portempe, sed li diris minace: "La indulgo ne estos ripetata alifoje." Per molaj kaj malmolaj rimedoj fine Song Giang subpremis ĉiujn kontraŭkapitulacajn opiniojn.

*(Daŭrigota)*

# Pentristeto

de **GUO LIANG**



# Fruktoj de scienca esplorado de instituto en kunlaboro kun fabrikoj

Kadroj kaj sciencaj laborantoj de la Grupo de Vitraj Duonkonduktantoj de la instituto serioze studas teorion pri la diktaturo de la proletaro.





En la Movado de Kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, laboristoj, kadroj kaj sciencaj laborantoj de la Ŝanhaja Silikata Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj resumis la sperton de scienca esplorado de la instituto en kunlaboro kun fabrikoj depost la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj plialtigis sian konscion en plenumado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Sub la gvido de la partia komitato, la sciencaj laborantoj de la instituto kombiniĝis kun laboristoj de kelkdek fabrikoj, akcelis la disvolviĝon de la scienca esplorado kaj akiris en tio grandan sukceson.


Diversformaj aparataj elementoj faritaj el la piezoelektra ceramikaĵo sukcese farita de sciencaj laborantoj en kombino kun laboristoj de la Ŝanhaja Lihin-fabriko de Radioaparataj Elementoj



Ekzamenite en produkta praktiko, la frukto akirita de sciencaj laborantoj kaj laboristoj de la kristalo-produkta laborejo de la Suĝoŭ-a Fabriko de Kondensatoroj en laboratorio pri produktado de kristalo kontribuis al altigo de scienca teorio kaj produktado.








En kunlaboro de koncernaj fabrikoj, la instituto sukcesis elfari sulf-arsen-vitran lumkonservan materialon, vitran elektro-konservan materialon kaj elementojn el ili.

# Malsovaĝigo de blanklipa cervo


La cervobredejo de Ĝido-gubernio de la Juŝu-a Tibet-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Kinghaj provis malsovaĝigi blanklipajn cervojn kaj atingis rimarkindan sukceson.

La blanklipa cervo estas rara besto por zoo kun relative alta ekonomia valoro. Tiu sovaĝa besto vivas en arbedaroj aŭ montaj herbejoj je 4,000-5,000 metroj super la marnivelo. Ĝi estas alta kaj bela. La vira havas gigantajn kornojn kun longeco de pli ol unu metro kaj maksimume 8 branĉoj. Oni povas detranĉi per segilo junkornojn de cervido en la dua jaro post ĝia naskiĝo.







Paŝtistoj de komunumoj aktive kaptas sovaĝajn blanklipajn cervidojn. Jen paŝtistoj donas kaptitajn cervidojn al la bredejo por malsovaĝigo.



La blanklipaj cervoj de la bredejo estas ofte paŝtataj surmonte por ke iliaj kornoj kresku rapide kaj bonkvalite.



Laborantoj de la bredejo ekzamenas ĵus detranĉitajn junkornojn.



La Ĉengdu-Kunming-a Fervojo



# Eburaj skulptaĵoj

Kolektado de Drogherboj



Al Fiŝado kun Panjo





KUL

世界语《中国报道》一九七六年第五期（本刊代号：二——九一五）